


EL POPOLA ĈINIO

中國新聞 1979 8



La Beijing-a Restoracio de Rostitaj Anasoj



La Beijing-a Restoracio de Rostitaj Anasoj



Bankeda halo



En manĝejo







Diversaj malvarmaj pladoj



Rostita anaso ĵus prenita el forno




Rostita anaso kaj dolĉa faba saŭco, ajlopecoj kaj maldikaj patkukoj




Preparado de diversaj specoj de anasaj pladoj


Anasa volvaĵo



Supo el anaso



Rostita anasa Brustajo



Krizantema anasa koro

Ekŝkurso de Ĉinaj kaj Fremdlandaj Esperantistoj de Beijing

Je la 19-a de majo de la kuranta jaro, Beijing-aj esperantistoj kune kun islanda esperantisto Ragnar kaj malta esperantisto Cliffordo Bora Marks, kiuj studas en la Beijing-a Universitato, ekskursis al Badachu kaj Xiangshan-parko.

Ambaŭ tiuj lokoj estas fame konataj pitoreskejoj en okcidenta antaŭurbo de Beijing. Tie troviĝas belaj montoj, torenta fontoakvo, kvietaj basenoj, famaj skulptaĵoj kaj konstruaĵoj de la 12-a — 14-a jarcentoj.

La ekskursantoj sate ĝuis la pejzaĝojn kaj faris multajn fotojn. Tagmeze ili piknikis en antikva kiosko de Xiangshan-parko. Post tio ili surgrimpis la monton. Ĉe la monttalio ili kunsidis por sin amuzi kaj iuj el ili prezentis programerojn en Esperanto. Ili ĉiuj ĝoje pasigis la tagon.



Por memoro

Spektatoroj



Interparolo



Prezentado de
programero

Geedziĝo de Juna Tibetana Paro

Cering Doje kaj Yu Zhen ambaŭ estas posteuloj de tibetaj liberigitaj servutuloj. Lastatempe tiu juna paro geedziĝis laŭ tibetana tradicia maniero.

La 28-jara novedzo Cering Doje estas ŝoforo de la Tibeta Meteologia Stacio, kaj la 25-jara novedzino Yu Zhen estas diplomito de la Fremdlingva Fakultato de la Sichuan-a Universitato kaj nun laboras kiel manipulanto de internacia longdistanca telefono de la Poŝta kaj Telekomunika Domo de Lhasa.

La novedzo kaj novedzino drapiritaj per *hada* (silkrubando) en sia geedziĝa ceremonio





En la ceremonio Cering Doje kaj Yu Zhen prezentas unu al la alia *hada* por esprimi reciprokan respekton kaj amon.



La nova paro prezentas hordean vinon al la gastoj.



Cering Doje kaj Yu Zhen promenas en parko.



La patrino de Yu Zhen (maldekstre) kuraĝigas la novajn geedzojn diligente labori por konstrui la novan Tibeton.

EL POPOLA ĈINIO

中國新道

1979
N-ro 8
(251)

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio
Generala distribuanto: Esperanta Sekcio de GUOZI SHUDIAN
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

SUR LA KOVRILO:

P.1. Hanbokou de Lushan

P.4. Kokbredado

(pentrita de
HUANG YONGYU)



Enhavo

La ĉina turisma afero en disvolviĝo	2
Pri pitoreskaj lokoj de Ĉinio	6
INTER NI: Kiel vojaĝi al Ĉinio	10
Mia vivo en Ĉinio	12
Nova Beijing-a Restoracio de Rostitaj Anasoj	14
Veterano ĉiam kun freŝa forto	16
Intervjuo kun filatelisto Jiang Zhifang	19
Pri unu postlabora lernejo de laboristoj kaj oficistoj	22
ESP-NOVAĴOJ	23
TRA ĈINIO: Monto Lushan	24
Ŝanĝiĝo de malnova plagita regiono	27
Surakva kliniko	32
Ĉinio partoprenis en la Unua Tergloba Eksperimento de TAEP	32
La Kvara Sportkunveno de ĈPLA	35
Giĉeto (Daŭrigo)	36
AMIKECO: Arto eminenta, amikeco profunda	41
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Dali en la tria monato	44
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Restaĵoj de konstruoj de la Okcidenta Zhou-dinastio	48
KURANTAJ AFEROJ	50

LA ĈINA TURISMA AFERO EN DISVOLVIĜO


de LU XUAN

LA ĉina turisma afero disvolviĝis relative rapide en la lastaj jaroj.


En 1954 fondiĝis la Ĝenerala Administracio de la Ĉina Internacia Vojaĝa Servo, kiu zorgas pri vojaĝado de fremdlandaj turistoj kaj ĉinaj elmigrintoj en nia lando. Kun la disvolviĝo de la turisma afero, fondiĝis la Ĉina Ĝenerala Administrativa Buroo de Turisma Afero en 1978, kaj ankaŭ administraj burooj pri turismo en plejparto de la provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj. Nun, ĉiam pli multiĝas turismaj servoj de diversaj landoj, kiuj havas rilatojn kun la ĉina turisma servo.

En la pasintaj pli ol 20 jaroj, nia lando akceptis turistojn el pli ol 60 landoj, regionoj de la mondo. En 1978, la nombro de fremdlandaj turistoj vizitintaj Ĉinion superis centmilon, kiu egalas la totalan sumon de la akceptitaj turistoj en la pasintaj 14 jaroj. Krome, ĉ. kvarcent mil ĉinaj elmigrintoj, samlandanoj de Xianggang (Hongkong), Aomen (Aŭmen) kaj Taivan revenis al la patrolando por vidi siajn parencojn kaj fari turisman vizitadon. Inter la venintoj troviĝis esperantistoj el pli ol dudek landoj.


Dum vizitado al Ĉinio fremdlandaj turistoj propraokule vidis ĝiajn historiajn objektojn, kul-



La fame konata restoracio Shan-waishan servanta al turistoj



La Ĉina Popola Banko emisiis, por turistoj kaj monero-kolektantoj, medalojn kun desegnoj de famaj antikvaj pitoreskejoj de Beijing.



La kvar oraj medaloj respektive kun desegnoj de la Granda Muro, la Blanka Pagodo de Beihai-parko, la Preĝejo de Riĉa Rikolto de la Ĉiela Altaro kaj la Somera Palaco



turon kaj arton, morojn, konstruajn atingojn kaj popolan vivon, kaj akiris pli bonan komprenon pri la nova Ĉinio. Multaj fremdlandaj amikoj, post reveno al sia patrolando, varme propagandis la novan Ĉinion per interparoloj, raportoj, verkoj, filmoj, ekspozicioj kaj aliaj formoj, pre-

zentis la amikecon de la ĉina popolo al diverslandaj popoloj kaj per tio faris kontribuon por plifortigi la solidarecon inter la popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj.

Kaj en la kontaktoj kun diverslandaj amikoj la ĉina popolo multe lernis de ili.



La hotelo Xihu ĉe la Okcidenta Lago de la urbo Hangzhou nun malfermiĝas al turistoj.




Speciala turisma trajno de la urbo Beijing al Badaling, kie estas la Granda Muro

Ĉinio havas la Grandan Muron, unu el la 7 mirindaj konstruaĵoj de la mondo: antikvajn urbojn kun historio de miloj da jaroj; mondfamajn kavarnarojn kun ŝtonaj skulptaĵoj; antikvajn maŭzoleojn kun subtera palaco kaj valorajn objektojn; Qomolangma (Gomolangma), la plej altan montopinton de la mondo; la Kanjonon de Changjiang-rivero, unu el la plej grandaj kanjonoj de la mondo; majestajn montojn kun belaj pejzaĝoj; pitoreskajn urbojn kun floroj en la tuta jaro; diversformajn stalaktitojn; vastajn stepojn; mirindajn glaciriverojn kaj neĝmontojn sur altebenaĵoj; historiajn lokojn de famaj kamparanaj movadoj; revoluciajn sanktejojn, kie la ĉina popolo faris grandan batalon en moderna tempo; palacojn kaj ĝardenojn kun la aparta nacia stilo; imponajn templojn; pitoreskajn lokojn por somerumado kaj ripozado. Ĉio ĉi tio pretigis favoran kondiĉon por disvolvi la turisman aferon. Por kontentigi la postulojn de diverslandaj amikoj, nia lando malfermis ekde la pasinta jaro alian nombron da famaj urboj kaj regionoj por turismo. Nun la nombro de tiaj urboj kaj regionoj jam superis 100.

Krom ekskurso al antikvaj vizitindejoj kaj pitoreskejoj, la fremdlandaj turistoj ankaŭ povas viziti fabrikojn, popolajn komunumojn, lernejojn, hospitalojn kaj templojn por koni morojn, kutimojn kaj vivon de diversaj naciecoj de Ĉinio. En Ĉinio sin trovas multaj termofontoj, lagbordaj kaj marbordaj urboj, kiuj estas bonaj lokoj

por kuracado kaj somerumado. Multaj revoluciaj memorindaj lokoj helpas niajn amikojn koni la historion de la ĉina popolo en la batalo por akiri la nacion sendependecon kaj emancipiĝon. Krome, fremdlandaj turistoj povas aĉeti diversajn delikatajn memoraĵojn kaj metiartaĵojn en diversaj lokoj de Ĉinio, gustumi lokajn famajn pladojn kaj specojn de teoj kaj apreci nacistilajn artajn prezentaĵojn.

Ĉinio ankoraŭ estas disvolviĝanta lando kaj alfrontas penigan taskon rapide disvolvi la nacion ekonomion kaj efektiviigi la modernigon de industrio, agrikulturo, scienco kaj teknikoj kaj nacidefendo. La ĉina turisma afero ankoraŭ estas en la unuapaŝa disvolviĝo kaj devas iri tre longan vojon por atingi la nivelon de la moderna turismo de la mondo, ekzemple niaj hoteloj estas malmultaj, trafikiloj nesufiĉaj kaj turismaj instalaĵoj kaj administrado neperfektaj. De la lasta jaro, nia lando faris grandan klopodon por plibonigi turismajn kondiĉojn, kiel ekzemple, projekti kaj konstrui turismajn lokojn, ekkonstrui nombron da hoteloj, grandigi aerodromojn, multigi flugajn liniojn kaj pasaĝerajn aviadilojn, aldoni specialajn trajnojn de Beijing ĝis Badaling (monto kun parto de la Granda Muro), de Shanghai (Ŝanhajo) ĝis Nanjing (Nankino), kaj de Shanghai ĝis Hangzhou (Hangĝoŭ), multigi aŭtomobilojn, importi aŭtobusojn kun aerrega instalaĵo, simpligi procedojn eniran kaj eliran por la turistoj, funkciigi turismajn lernejojn,



Fotado dum veturado


eldoni bildokartojn kaj albumojn pri pejzaĝoj kaj kulturaj objektoj, plimultigi vendejojn de turismaj memoraĵoj kaj metiartaĵoj.

Nun niaj turismaj servoj ĉiamaniere klopodas por multigi restoraciojn kaj litojn; rapidigi konstruadon de hoteloj en Beijing, Shanghai, Guang-

zhou, Hangzhou, Guilin kaj aliaj sume 30 urboj, kaj trakti kun fremdlandaj komercistoj pri konstruado de hoteloj per fremdlanda kapitalo; altigi transportan povon de aviadiloj, trajnoj kaj aŭtobusoj; funkciigi pliajn turismajn lernejojn en iuj provincoj kaj municipoj; racie aranĝi turismajn itinerojn kaj plibonigi la servadon. Laŭ la intereso kaj ŝato de la turistoj ni laŭplane malfermos novajn turismajn punktojn, regionojn kaj centrojn por ke ili povu tie ekskursi, pasigi feriojn, kuraciĝi kaj somerumi, aranĝos laŭriverajn kaj laŭmarbordajn vojaĝojn kaj aktivadojn de ĉasado, skiado, montogrimpado, rajdado sur ĉevaloj kaj kameloj, eĉ loĝado en mongolaj jurtoj kaj tranoktado en bambuaj etaĝdomoj.

Ĉiam pli multiĝas amikaj kontaktoj de nia lando kun diverslandaj popoloj kaj troviĝas ĉiam pli multe da fremdlandaj amikoj, kiuj volas koni la novan Ĉinion kaj arde esperas vojaĝi al Ĉinio. Kun la disvolviĝo de la nacia ekonomio de nia lando nia turisma afero certe havos rapidan progreson.

Ebura, osta kaj santala ventumiloj produktitaj en Hangzhou por turistoj





Aŭroro de Yangshuo

XIN HUA:

Pri Pitoreskaj Lokoj de Ĉinio

ĈINIO havas vastan teritorion. En la okcidenta kaj nordorienta partoj de ĝi troviĝas majestaj gigantaj montĉenoj, kiuj trapasas plurajn provincojn kaj finiĝas per malaltaj montoj kaj montetoj. Inter ili estas altebenaĵoj, ebenajoj, kanjonoj, basenoj, miloj da lagoj kaj riveroj fluantaj orienten en Pacifikon. Krome, multaj insuloj defendas la marbordon de Ĉinio.

Sur tiu tre varia kaj vasta lando dislokiĝas sennombraj pitoreskaj lokoj.

En Ĉinio troviĝas multaj montoj famaj pro siaj belaj pejzaĝoj. Taishan-monto de Shandong-provinco de orienta Ĉinio alta je 1,524 metroj super la mara nivelo estis sanktejo al kiu pilgrimis ĉinaj antikvaj regantoj. Sur ĝi la vi-

zitantoj povas rigardi sunleviĝon. Huangshan-monto de Anhui-provinco allogis al si multajn turistojn per siaj varieco, kuriozaj pinoj, rokoj, nubomaro kaj termofontoj. Ĝi estis nomata la “Unua Mirinda Monto de Ĉinio”. Lushan-monto apud Poyang-lago en Jiangxi (Gianghi)-provinco estas ideala someruma loko. Zhejiang-provinco ĉe la bordo de la Orienta Ĉina Maro havas multajn famajn montojn, inter ili la montoj Moganshan kaj Yandangshan estas la plej fame konataj. Ili havas diversajn kuriozajn montpintojn, akvofalojn kaj ĉarmajn pitoreskejojn. Jigongshan de Henan-provinco de centra Ĉinio estas alinomata “Parko en Nuboj”. Emeishan-monto de Sichuan-provinco estas eleganta kaj ĉarma, antikvaj temploj, kioskoj kaj aliaj belaj konstruaĵoj vidiĝas inter ĉielskrapantaj arbegoj. Turistoj iafoje povas vidi tie raran naturan fenomenon de lumo.


En la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono kaj la provincoj Guizhou kaj Yunnan troviĝas multaj belaj karstaj pejzaĝoj. Inter ili la plej vizitindaj lokoj estas ĉe Guilin kaj Yangshuo. Oni diras: “La pejzaĝoj de Guilin estas la plej belaj en Ĉinio, sed tiuj de Yangshuo estas la plej belaj en Guilin.” En la kavernoj de tiu regiono troviĝas diversformaj stalaktitoj kaj stalagmitoj. En tiuj lokoj la montoj plejparte leviĝas abrupte sur ebenejo kaj havas groteskajn formojn. Veturante sur la blua rivero Lijiang kun belaj pejzaĝoj ambaŭborde, oni sentas sin kvazaŭ en paradizo. En Yunnan estas multaj kalkŝtonaj kolonoj kreitaj de la vetero, kun alteco de 20 ĝis 40 metroj, kiuj formis originalan pitoreskejon.


Multaj grandaj riveroj de Ĉinio fendis montegojn kaj formis kanjonojn tre majestajn. Inter ili la plej fama estas la kanjono de Changjiang (Jangzi)-rivero oriente de Sichuan kaj okcidente de Hubei, kiu estas unu el la plej grandaj kanjonoj de la mondo. Nun fremdlandaj turistoj povas rigardi tieajn pejzaĝojn per apartaj turismaj ŝipoj.

Lagoj dislokiĝas kiel perloj sur la vasta tero de Ĉinio. Ĉe antaŭurbo de Zhaoqing de Guangdong-provinco estas sep belaj rokmontoj kun

mirindaj kavernoj kaj ses lagoj ĉe la montpiedo. Estas tre interese, ke oni povas veturi per boato en kaverno. Oriente de Urumqi, la ĉefurbo de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, estas Tianchi-lago de Tianshan-montaro, kies blua akvo spegulas glaciajn montpintojn, ĉirkaŭ la

La akvofalo Longtan de Jinggang-montoj





Huangshan-monto

lago estas herbejo, kreskas piceoj kaj paŝtigas brutaroj. Sude de Kunming, la ĉefurbo de Yunnan (Junnan)-provinco estas pitoreska Dianchi-lago. La vasta Taihu-lago troviĝas apud la urbo Wuxi de Jiangsu-provinco, en ĝi estas 72 montetoj kaj ĉirkaŭe de ĝi troviĝas parkoj kun nacia gusto.


Multaj estas ankaŭ pitoreskaj urboj de Ĉinio. Zhejiang-provinco havas la ĝardenan urbon Hangzhou kun la ĉarma Okcidenta Lago, fame konata tra la mondo. Suzhou de Jiangsu (Giangsu)-provinco havas pli ol 170 ĝardenojn kiuj koncentriĝe montris la ĝardenan arkitekturon kun originala gusto, kreitan de la laboruloj ekde la 10-a jarcento. Pri la Urbo de Fontoj — Jinan de Shandong-provinco oni diras, ke “ĉe ĉiu domo estas fonto kaj plorsaliko”.

Sur la longa marbordo de nia lando estas multaj belaj urboj. Guangzhou (Kantono) kun historio de 2,800 jaroj estas unu el la ĉinaj havenurboj, kiuj komercis plej frue kun aliaj landoj. La urbo Xiamen ĉe la Orienta Ĉina

Maro famiĝis pro la bela Gulangyu. La havenurbo Lianyungang ĉe la Flava Maro havas Yuntaishan-monton kie tutjare pompas floroj. Beidaihe, kiu ĉijare malfermiĝis al turistoj, estas someruma loko kun longa historio ĉe Bohai-marĉo. Ĝi havas ĉarmajn pejzaĝojn, favoran klimaton kaj banlokon longan de pli ol 10 km. kun mola kaj ebena plaĝo tre taŭga por sunbano kaj marbano. Ankaŭ la belaj kaj puraj urboj Qingdao, Yantai kaj Dalian jam malfermiĝis al turistoj.

La pejzaĝoj de Ĉinio estas tre variaj. En la sudo estas ĉarmaj subtropikaj pejzaĝoj. Sur la senlime vasta stepo de Interna Mongolio en la nordo la paŝtataj ŝafaroj kuniĝas kun blankaj nuboj. Sur la Tibeta Altebenaĵo brilas neĝkovritaj montoj kaj glaciaj riveroj sub la suno.

En Ĉinio ĉie troviĝas antikvaj vizitindejoj kun longa historio. Multaj el ili estas en pitoreskaj lokoj. La antikva Granda Muro longas je pli ol 6,700 km. kaj estas unu el la sep spektakloj de la mondo. Nun oni povas ne nur rigardi ĝian



Qixingyan en Zhaoqing de Guangdong

parton nordokcidente de Beijing, sed ankaŭ ascendi la “Unuan Pasejon de Ĉinio” — Shanhaiguan-pasejon, de kiu komenciĝas la Granda Muro. Ĉinio havas ŝtonajn kavernojn de artaĵoj, el kiuj la plej famaj estas Yungang-kavernaro de Datong de Shanxi (Ŝanĥi)-provinco, Longmen-kavernaro de Luoyang de Henan-provinco kaj Dunhuang-kavernaro de Gansu-provinco. En tiuj ŝtonaj kavernoj konserviĝas antikvaj lerte skulptitaj budhoj kun bela formo kaj raraj freskoj kun vivecaj figuroj. Sur kruta rokmuro apud Minjiang-rivero de Leshan-gubernio de Sichuan troviĝas la plej granda ŝtonskulptita budho en Ĉinio kun alteco de 71 metroj.

Ĉinio havas multajn urbojn kun longa historio. La ĉefurbo Beijing jam havas historion de pli ol 800 jaroj kaj posedas multajn antikvajn lokojn kaj parkojn. La Imperiestra Palaco, la 13 Maŭzoleoj de Ming-dinastio, la Ĉiela Altaro, la Somera Palaco kaj Beihai-parko ĉiu havas sian apartan belon. Ankaŭ Nanjing (Nankino) havas nemalmultajn historiajn lokojn, el kiuj la ĉefaj

estas la Maŭzoleo de Sun Zhongshan (Sun Jatsen), la maŭzoleo Xiaoling de Ming-dinastio, Xuanwu-lago kaj Mochou-lago. Xi'an de Shaanxi (Ŝenĥi)-provinco havas historion de pli ol 3,000 jaroj, kaj 11 dinastioj prenis ĝin kiel sian ĉefurbon. Ĝi posedas Dayan-pagodon, Huaqingchi kaj aliajn historiajn vizitindejojn. La templo Baima en Luoyang de Henan-provinco laŭdire estas konstruita en la regtempo de imperiestro Mingdi de la Orienta Han-dinastio (58-75 p. K.). Ankaŭ Potala-palaco kaj Cula-kang-templo de Lhasa, la ĉefurbo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, estas fame konataj antikvaj konstruaĵoj.

Plejparto de tiuj pitoreskaj lokoj, post riparado kaj ordigo fare de la popola registaro, jam akceptas turistojn kaj la ceteraj malfermiĝos al turistoj post nelonge.

La kaverno Mogao de Dunhuang



KIEL VOJAĜI AL ĈINIO

Ni ricevis leterojn de legantoj kun demandoj pri la procedoj, veturaj linioj kaj aliaj atentendaj aferoj pri vojaĝo al Ĉinio. Por informiĝi pri tio ni intervjuis la Ĉinan Internacian Vojaĝan Servon. Jen nia raporto.

LA RED.

DEMANDO: Al kiuj institucioj oni devas prezenti sian peton por vojaĝi al Ĉinio?

RESPONDO: Se turista grupo aŭ individuo volas vojaĝi al Ĉinio, ili povas kontaktiĝi kun la ambasado aŭ konsulejo de Ĉinio en la koncernata lando, rondoj amikaj al Ĉinio, turismaj servoj en ligo kun la Ĉina Internacia Vojaĝa Servo (ĈIVS) aŭ rekte kun ĈIVS. Por ke oni ĝuste kaj bone aranĝu la turisman servon, la turista grupo aŭ individuo devas doni al ĈIVS detalan informon pri jeno: Kiom da membroj la grupo havas kaj kiun nomon ĝi portas? La nomo, ŝtataneco, aĝo, sekso, profesio de ĉiu membro, kun edz(in)o aŭ ne. Al kiuj urboj ili volas vojaĝi kaj kiujn postulojn ili havas? Kiom da tagoj ili volas resti en Ĉinio, je kiu loko kaj je kiu tago ili volas eniri kaj eliri, kiajn veturilojn ili volas en la vojaĝo kaj en kiu lingvo ili parolas?

DEMANDO: Kie oni povas peti vizon?

RESPONDO: Ĉiu fremdlanda turista devas havi validan vizon de Ĉinio. Por peti vizon de Ĉinio, oni povas prezenti sian peton al la ambasado aŭ konsulejo de Ĉinio en la koncernata lando. Se la turista estas en Xianggang (Hongkong), li povas komisi tian al la Ĉina Vojaĝa Servo de Xianggang.

DEMANDO: Kiajn postulojn de la ĉina doganejo la turista devas plenumi?

RESPONDO: Iu fremdlanda turista, kiu volas eniri aŭ forlasi Ĉinion, devas plenumi "Tabelon de Pasaĝeraj Pakaĵoj kaj Objektoj" kaj

doni sian tutan kunportadon al la doganejo por ekzameno.

Ĉiu turista povas senimposte kunporti survoje bezonatan manĝaĵon, 2 botelojn da alkoholaĵo kaj 400 cigaredojn. La turista povas enporti mem uzatajn brakhorloĝon, sonregistrilon, fotilon aŭ pluruzan fotilon kaj filman kameraon, kiujn oni ne povas vendi aŭ transdoni al aliuloj kaj devas elporti el Ĉinio.

Se la turista enportas donacaĵojn al siaj parencoj kaj amikoj, aŭ objektojn anstataŭ aliuloj, li devas deklari tion al la doganejo kaj plenumi necesajn procedojn.

La turista povas kunporti valuton kaj vojaĝan Renminbi-ĉekon de ĉiu ajn monsumo kaj la restaj partoj povas esti elportitaj.

DEMANDO: Kia mono cirkulas en Ĉinio? Kiel la turista devas ŝanĝi sian fremdlandan monon?

RESPONDO: La ĉina mono estas Renminbi emisiita de la ŝtata Ĉina Popola Banko. Ĉiu turista devas deklari, ĉe la eniro en Ĉinion, al la doganejo la sumon de la kunportitaj fremdlandaj mono kaj valutoj. Por faciligi la vojaĝon de turistoj, la Banko de Ĉinio komisiis al sia filia banko en Xianggang kaj Aomen (Aŭmen), ke ili vendu vojaĝajn ĉekojn de Renminbi. Kunportante tian ĉekon kaj valutojn, la turista povas ŝanĝi ilin en Renminbi-on laŭ la kurzo publikigita de la Ĉina Popola Banko, ĉe la Banko de Ĉinio en diversaj lokoj, aŭ difinitaj filioj de

la Ĉina Popola Banko kaj agentaj monoŝanĝaj punktoj en hoteloj, aerodromoj kaj magazenoj. La turistoj devas ŝanĝi la neelspezitan Renminbion en fremdlandan monon antaŭ sia forlaso de Ĉinio.

DEMANDO: Kiajn servojn la Ĉina Internacia Vojaĝa Servo povas plenumi?

RESPONDO: Ĝi povas plenumi jenajn servojn:

1. Interpretado kaj gvidado;
2. Helpo je alveno kaj foriro;
3. Aranĝo de vojaĝo en kaj ekster Ĉinio;
4. Servo de pakajoj;
5. Vizo por eniro, eliro, transiro, rezido kaj vojaĝo;
6. Mendo de ĉambro en hotelo kaj luo de taksio;
7. Aĉeto, mendo kaj subskribo de pasaĝera bileto de trajno, aviadilo, ŝipo kaj aliaj;
8. Aranĝo de deklaro kaj ekzameno al la doganejo.

DEMANDO: Kiel statas la trafiko por vojaĝi al Ĉinio?

RESPONDO: La Civila Aviada Administracio de Ĉinio (CAAC) kaj fremdlandaj aviadaj kompanioj havas regulajn flugojn inter Beijing (Pekino) kaj Pyongyang, Hanoi, Moskvo, Rangoon, Osaka, Tokio, Karachi, Parizo, Tehran, Bukareŝto, Beogrado, Frankfurto, Addis Ababa, Ĝenevo, Zurich, Ateno, Rawalpindi, Bombay kaj Adeno.

Inter Beijing kaj Pyongyang, Hanoi, Ulanbator kaj Moskvo regule veturas internaciaj trajnoj. Inter Guangzhou (Kantono) kaj Xianggang ĉiutage veturas trajno kaj aerkusena ŝvebveturilo.

DEMANDO: Kia estas la klimato de Ĉinio? Kiajn vestojn oni devas kunporti por vojaĝi al Ĉinio?

RESPONDO: La plejparto de Ĉinio estas en la norda mezvarma zono kaj havas kvar klare distingeblajn sezonojn, konvenajn al vojaĝo. Pro sia vasta teritorio ĝi havas tre diferencajn

klimatojn. Printempe kaj aŭtune en plejparto de Ĉinio oni povas porti malpezajn vestojn kaj lanajn trikitajn vestojn. Somere ĉemizo sufiĉas, sed vintre oni devas porti dikajn drapan surtuton por ŝirmi sin eksterdome. Ofte pluvas en la komenco kaj fino de somero, tial estas oportune por turistoj kunporti pluvan mantelon.

DEMANDO: Kiujn urbojn kaj regionojn Ĉinio malfermis al fremdlandaj turistoj?

RESPONDO: Ĉinio nun malfermis jenajn urbojn kaj regionojn al alilandaj turistoj: Beijing, Shanghai, Tianjin, Guangzhou, Zhaoqing, Haikou de Hainan-insulo, Foshan, Conghua, Hangzhou, Shaoxing, Ningbo, Wenzhou, Yangdangshan-monto de Leqing, Moganshan-monto, Nanjing, Zhenjiang, Wuxi, Suzhou, Yangzhou, Yixing, Lianyungang, Xuzhou, Huai'an, Changzhou, Hefei, Wuhu, Ma'anshan, Huangshan-monto. Jiuhuashan-monto de Qingyang, Jinan, Qingdao, Taishan-monto de Tai'an, Zibo, Yantai, Changwei, Shijiazhuang, Handan, Qinhuangdao, Zhaozhou-ponto, Xibaipo, Gangnan-akvokonservejo, Chengde, Zunhua, Shashi, Tangshan, Shenyang, Anshan, Fushun, Dalian, Changchun, Jilin. Harbin, Nanning, Guilin, Liuzhou, Wuming, Yangshuo, Guiping, Binyang, Chengdu, Chongqing, Wanxian, Leshan, Emei-monto, Kunming, Ŝtona Arbaro de Lunan, Jinghong de Xishuangbanna, Nanchang, Lushan-monto, Jinggang-montoj, Jingdezhen, Changsha, Shaoshan, Dongting-lago de Yueyang, Xiangtan, Hengyang, Wuhan, Shashi, Xiangfan, Danjiang, Xianning, Zhengzhou, Kaifeng, Luoyang, Jigong-monto de Xinyang, Anyang, Linxian, Xinxiang, Huixian, Gongxian, Yuxian, Sanmenxia, Xi'an, Yan'an, Taiyuan, Datong, Yangquan, Dazhai, Huhhot, Baotou, Xilinhote, Lanzhou, Jiuquan, Jiayuguan, Dunhuang, Tianchilago de Urumqi, Shihezi, Turpan, kaj la olekampoj Daqing, Dagang kaj Shengli.

Fremdlandaj turistoj povas vojaĝi al tiuj urboj kaj lokoj laŭ la linio interkonsentita kun la ĝenerala administracio de ĈIVS.

Ĉiuj leteroj kaj telegramoj pri vojaĝo al Ĉinio estu sendataj rekte al la Ĉina Internacia Vojaĝa Servo, N-ro 6, Orienta Chang'an-strato, Beijing, Ĉinio. Telegrafa adreso: LUXINGSHE Beijing.

Mia Vivo en Ĉinio



de islanda esperantisto RAGNAR

MI venis al Ĉinio en oktobro 1975. Tiam mi estis nur 19-jara kaj ĵus finis studadon de mezlernejo en Islando.

Kiam mi venis, mi ankoraŭ povosciis nenion en la ĉina lingvo. Kaj fakte mi sciis tre malmulte pri Ĉinio. Ĉinio ja estas tiel malproksima de Islando, kaj en la lernolibro de mondhistorio, kiun mi legis en la malalta mezlernejo, nur estis du paĝoj pri la historio de Ĉinio. Krom tio mi sciis, ke Ĉinio havas tre longan historion kaj riĉan kulturen heredaĵon, ke la ĉina popolo estas la plej granda en la mondo kaj ke oni konstruas socialismon en Ĉinio. Kvankam mi sciis tiel malmulte pri Ĉinio, tamen tio sufiĉis por ke mi interesiĝu pri la lando. En Islando mi fakte aliĝis al la Islanda-Ĉina Kultura Asocio jam antaŭ ol mi eksciis pri la ebleco por mi veni al Ĉinio por studadi.

Somere de 1975, la Eduka Ministrejo de Islando faris anoncon, en kiu ĝi diris ke la ĉina registaro volas doni stipendion al du islandaj studentoj por lerni en Ĉinio. Mi tuj pensis, ke tio estas

S-ro Ragnar kun sia edzino en Xiangshan-parko de Beijing



S-ro Ragnar

bona ŝanco por mi ekkoni Ĉinion kaj ankaŭ mi pensis, ke estas tre grave disvolvi la interrilaton inter Islando kaj Ĉinio. Tial mi kaj unu alia islanda studento (Tryggvi Hardarson) venis ĉi tien kiel la unuaj islandaj studentoj en Ĉinio. (Krom unu homo antaŭ preskaŭ dudek jaroj). Li intencis lerni historion kaj mi filozofion, ĉar mi pensis ke tiel mi eble povos lerni plej multe pri hodiaŭa Ĉinio, la ĉinoj diras ja, ke teorio devas gvidi praktikon.

Ĉar en la komenco mi tute ne povis paroli unu vorton en la ĉina lingvo, tial preskaŭ kiel ĵus naskita infano mi devis resti dum naŭ monatoj en la Beijing-a Lingva Instituto por lerni la lingvon. Tiam mi trovis tre multajn malfacilaĵojn. Unue, kompreneble estis lingvo. Ni du islandanoj nur povis interparoli en nia nacia lingvo kaj parolante kun aliuloj ni devis uzi la anglan lingvon, kaj kiam ni parolis kun homoj de la aliaj nordaj landoj, ni devis uzi la danan (skandinavoĵ ĉiam pensas ke islandanoj devas povosci la danan kaj fakte ni ĉiuj lernas la danan krom la anglan nur kiel eksterlandan lingvon). Sed la malfacilaĵoj ne nur estis lingvoj. Por mi veninta de insula klimato kun malseka vetero, la seka klimato de Beijing kun ĝia ekstrema vintra malvarmeĉo kaj precipe la somera varmeĉo estas tre malfacila.

Kvankam la ĉina manĝaĵo estas tre malsimila al la islanda ŝafviand-fiŝ-terpomo, tamen mi ne havis iujn grandajn malfacilaĵojn en tio kaj

hodiaŭ ĉina manĝaĵo plaĉas al mi pli ol la islanda.

Kelkfoje homoj demandis min, ĉu mi trovis Ĉinion alia ol mi antaŭe pripensis. Mi nur povas nei al tiu demando, ĉar antaŭ ol mi venis ĉi tien, mi fakte sciis tro malmulte pri Ĉinio por multaj antaŭpripensoj. Sed post mallonga tempo mi eltrovis, ke en interrilato kun ĉinoj ekzistis iu muro kiu ne nur estis lingva kaj kiun mi antaŭe ne pripensis.

En la Lingva Instituto mi havis ĉinan kunloĝanton, sed mi rimarkis ke li tre malvolonte parolis pri siaj propraj opinioj, sperto kaj scio pri kio okazis en Ĉinio. Kiam mi iom post iom eklernis la ĉinan lingvon, mi ekvidis ke kvankam estis homoj ĉie, surstrate, aŭtobuse aŭ restoracie, kaj ĉiuj tre ŝatis paroli kun mi, tamen ili estis iom timemaj kaj ne kuraĝis amikiĝi.

Mi havis grandajn malfacilaĵojn kompreni, kiel tio do povis esti. Ankaŭ mi vidis kelkajn aliajn strangajn aferojn, ekzemple miaj ĉinaj kunstudentoj en la Lingva Instituto ĉiuj estis pli ol dudek-jaraj kaj ĵus komencis lerni sian unuan fremdan lingvon. Kelkaj el ili tute ne povis paroli en la angla lingvo post tri-jara lernado. Mi eksciis, ke ili uzis grandan tempon por politikaj kunvenoj en kiuj ili devis partopreni. Tiam ili ankaŭ devis skribi kritikajn artikolojn malgraŭ ke neniu el ili povis klarigi por mi la enhavon de la kritiko. Ĝuste en tiu tempo Zhou Enlai forpasis; tio estis la unua fojo por mi, ke mi vidis tutan nacion plori.

Somere en la jaro 1976 mi finis mian studadon en la Beijing-a Lingva Instituto kaj venis al la Beijing-a Universitato por ekstudi mian fakan scion. Sed mi ne povis tuj komenci, ĉar la politika situacio estis tre ŝanĝiĝema kaj la alveno de miaj ĉinaj kunstudentoj prokrastiĝis je duono da jaro. Precipe en tiu tempo la granda gvidanto de la ĉina popolo Mao Zedong forpasis.

Dum kelkaj jaroj antaŭ sia morto Mao estis iom malsana kaj ne povis persone partopreni en la politika debato. Kelkaj fihomoj kiujn oni plej ofte nomas “kvarpersona bando” utiligis tiun situacion kaj post la morto de Mao ili provis uzurpi al si mem la politikan aŭtoritaton en Ĉinio. Sed ili malsukcesis, kaj ili mem estis forigitaj el la gvidantaro.



S-ro Ragnar kaj esperantistoj de la Beijing-a Lingva Instituto

Post la forigo de la “kvarpersona bando” mi jam spertis multajn ŝanĝojn en la ĉina socio. La ĉinoj kiuj antaŭe apenaŭ kuraĝis paroli kun mi nun esprimas siajn proprajn opiniojn pri ĉio kaj mi ekhavis multajn geamikojn.

En la periodo de la “kvarpersona bando” iuj kontraŭstaris ĉion eksterlandan, ĉar ĉio estas “kapitalista” kaj tiel ni eksterlandaj studentoj en Ĉinio estis ankaŭ “kapitalistaj” kaj “malamikoj de Ĉinio”! Mi kiel eksterlanda studento en Ĉinio tre bone komprenas la malamon de la ĉina popolo kontraŭ la bando.

Hodiaŭ mi havas multajn ĉinajn geamikojn. Inter ili troviĝas kelkaj esperantistoj kiujn mi ekkonis pere de Esperanto. Dum la unuaj monatoj post kiam mi venis al Ĉinio, mi estis tro okupata lerni la ĉinan lingvon por kontaktiĝi kun ĉinaj esperantistoj, sed post duonjaro mi skribis leteron al El Popola Ĉinio kaj ricevis respondon, tiel ke mi iom post iom interkonatiĝis

kun iuj de la laborantoj de la revuo. Sed fakte mi vere koniĝis kun la ĉinaj gesamideanoj nur post la falo de la "kvarpersona bando".

Nun mi ofte renkontiĝas kun ili kaj priparolas kun ili la situacion de Esperanto en Ĉinio, la mondan Esperanto-movadon kaj aliajn aferojn. Lastatempe mi ankaŭ vizitis iujn el ili en iliaj hejmoj kaj renkontis iliajn familianojn. Tio tute ne estis ebla dum la unuaj du jaroj en kiuj mi restadis en Ĉinio.

Precipe post kiam mi komencis instrui Esperanton al kelkaj miaj ĉinaj kunstudentoj, mia kontakto kun la ĉinaj esperantistoj pliiĝis. Ili helpis al mi trovi lernomaterialojn (libro kompilita de sinjoro Tikos, laboranto de EPC) kaj donis al mi subtenon.

Tiel mi mem trovas Esperanton tre helpa ilo por amikeca interrilato kun ĉinoj.

Kvankam mi loĝas kaj studas en Beijing, tamen mi jam vizitis multajn aliajn lokojn en Ĉinio, ekz., Shanghai, Nanjing, Hangzhou, Xi-an, Changsha kaj aliajn urbojn.

Ĉie oni povas vidi restaĵojn de la ĉina kultura heredaĵo apud multaj novaj konstruaĵoj kiuj montras tre interesan kontraston inter la malnova kaj nova Ĉinio.

Ankaŭ mi ĉie trovas la homojn afablaj, amikaj kaj scivolemaj pri eksterlandanoj. En Ĉinio ja ne estas multaj eksterlandanoj kaj ni aspektas tute fremdaj al la homoj en kelkaj lokoj, kiuj eble neniam antaŭe vidis eksterlandanojn.

Ĉi-jare somere mi finos mian studadon en Ĉinio kaj foriros al Japanio por loĝi kune kun mia edzino kiu estas japanino. Ni koniĝis ĉi tie antaŭ du jaroj kiam ŝi studis historion en la Beijing-a Universitato. En Japanio mi intencas lerni la japanan lingvon, ĉar ĝis nun mi kaj mia edzino nur povis uzi la ĉinan lingvon kiel la komunan. Eble mi ankaŭ daŭrigos tie mian studadon de filozofio.

Mi baldaŭ finos mian studadon ĉi tie, mi estas certa, ke estontece mi venos multfoje al Ĉinio por renkonti miajn geamikojn ĉi tie.

HUAWEN:

NOVA BEIJING-A RESTORACIO DE ROSTITAJ ANASOJ



MANGI bongustan rostitan anason estas plezuro por multaj homoj vizitintaj Beijing.

Antaŭ nelonge la nove konstruita Beijing-a Restoracio de Rostitaj Anasoj komencis akcepti klientojn.

Nun pli multaj ĉinoj kaj eksterlandaj gastoj povas frandi rostitan beijing-an anason kiu estas fama

Vicdirektoro Cai Qihou kaj kuiristoj esploras gastronomion de varmaj kaj malvarmaj pladoj.

Jus elfornigitaj rostitaj anasoj



eltrovaĵo de ĉina imperiestra kuirrejo.


La nova Beijing-a Restoracio de Rostitaj Anasoj situas sur la strato Hepingmen en la urbo. Ĝi estas sepetaĝa domo kun areo de 15,000 kvadrataj metroj. Ĝi havas 41 grandajn kaj malgrandajn halojn, kiuj povas samtempe liveri manĝaĵon al 2,600 klientoj. La festena halo estas en la kvara etaĝo kaj povas enteni 600 klientojn por preni diversajn pladojn preparitajn el la viando kaj internaĵo de rostitaj anasoj. En ĉiu etaĝo kun manĝoĉambroj troviĝas ankaŭ ĉambroj por rosti anason, kuirado, manĝaj-preparado kaj ripozo. Kaj la ĉambroj por buĉi kaj fridigi anason estas en la kelo.

Kiel la aliaj restoracioj de rostitaj anasoj en Beijing, tiu restoracio preparas, per speciala forno, sian rostaĵon el speciale breditaj anasoj.

Preparado de rostita beijing-a anaso estas delikata laboro bone plenumbla nur de kuiristoj fake trejnita. La rostita beijing-a anaso havas delikatan viandon kun haŭto fragila kaj ruĝkolora, plaĉe bonodoras kaj estas grasa sed ne senapetitiga (Bv. vidi "Rostita Pekina Anaso" de la 6-a numero de nia gazeto de 1978).

Ĉar la rostita beijing-a anaso estas bongusta plado eltrovita de la imperiestra palaco, tial ankaŭ la maniero por frandi ĝin estas diversa. Ordinare oni tranĉas la viandon de ĵus rostita anaso kun haŭto en maldikajn pecojn kaj envolvas ilin kun spicaĵo kaj tubaĵlo en maldikan patkukon. Laŭ la malsamaj sezonoj oni povas frandi ĝiajn viandpecojn kun distranĉita rafano aŭ kukumo. Kaj ŝatantoj de dolĉaĵoj povas manĝi ĝin kun sukero.

La rostita beijing-a anaso jam havas historion de pli ol 300 jaroj. La rostita anaso aperis unue en la



Beijing-a Restoracio de Rostitaj Anasoj

imperiestra palaco de Jinling (la nuna Nanjing de Jiangsu-provinco). En la 15-a jarcento Ming-dinastio translokis sian tronon al Beijing kaj la arto de rostado iom post iom disvastiĝis en la popolo. Krome la rostita anaso de Beijing estas pli bona en korpoformo kaj viando ol tiu de Nanjing. En la lastaj jaroj de Qing-dinastio (1644-1911 p.K.) la arto de rostado multe altiĝis kaj la rostita beijing-a anaso vaste famiĝis pro sia bongusteco.

Tiam restoracio de rostitaj anasoj en Beijing nomata Quanjude, kiu fondiĝis en la jaro 1866, estis la plej fame konata.

Post la Liberiĝo la Quanjude-a Restoracio de Rostita Anaso ekster Qianmen-Pordego estis alinomita la Beijing-a Restoracio de Rostitaj Anasoj. Kaj ankaŭ ĝia entreprena maniero estis plibonigita. Klientoj povas tie havigi al si anason tutan, aŭ duonan aŭ kvaronan, por manĝi tie aŭ kunporti la rostaĵon kun spicaĵoj al sia hejmo. Dank' al tio la Beijing-a Restoracio de Rostitaj Anasoj ricevis rapidan disvolviĝon. Por akcepti pli multe da ĉinaj kaj fremdlandaj klientoj ĝi faris plikonstruadon kaj konstruis novan restoracion de rostitaj anasoj sur la komerca strato Wangfujing. Kaj krome, en Beijing troviĝas ankoraŭ pluraj restoracioj de rostitaj anasoj. Kuiristoj de la Popola Halo, la

Beijing-a Hotelo kaj multaj aliaj grandaj restoracioj ellernis la arton rosti anasojn. La Beijing-a Restoracio de Rostitaj Anasoj kun historio de pli ol cent jaroj konservas sian tradician kuirmanieron. Ĉinaj gvidantoj ofte donas tie festenon al fremdlandaj gastoj. En sia vizitado al Ĉinio usona eksprezidanto Nixon kaj japana eksĉefministro Tanaka Kakuej donis bankedon al siaj sektantoj speciale en la restoracio.

La nova restoracio estas la plej granda restoracio en Beijing kaj povas akcepti pli ol 5,000 klientojn ĉiutage. La du restoracioj ekster Qianmen-Pordego kaj ĉe Wangfujing-strato funkcias kiel ĝiaj filiaj butikoj.

La Beijing-a Restoracio de Rostitaj Anasoj havas famajn majstrajn rostistojn kaj kuiristojn. Ĝiaj majstroj, Zhang Wenzao, Tian Wenkuan, Li Decai kaj Wang Chunlong havas sperton de jardekoj kaj altan arton. Ĝia 57-jara vicdirektoro Cai Qihou estas fama majstra kuiristo en Beijing. En komuna klopodo li kaj veteranaj kuiristoj povas prepari anas-internaĵojn en pli ol 80 specojn de varmaj kaj malvarmaj pladoj bongustaj. Nemalmultaj fremdlandaj gastoj taste salutis al tiuj majstroj en festenoj, laŭdante, ke ili estas ne nur eminentaj kuiristoj, sed ankaŭ elstaraj artistoj.

VETERANO ĈIAM KUN FREŜA FORTO

—*Pri Prof. Ŝecencz*

ĈE la renkontiĝoj de Wuhan-aj esperantistoj oni ofte vidas, inter ili, homon kvankam maljunan, tamen viglan. Li ĉiam estas ĉirkaŭata de scivolemaj junuloj, kiuj ja multe profitis de li.

Kiu do li estas?

Li estas Prof. Ŝecencz, dekano de la fremdlingva fakultato de la Centra-Ĉinia Pedagogia Instituto, kaj senlaca esperantisto. Li estas ankaŭ poeto, lingvisto kaj literatoro.

1.

Prof. Ŝecencz naskiĝis en la familio de ĉin-medicina kuracisto en urbo apud Changjiang (Jangzi-rivero), en 1907. Liaj gepatroj iam vivintaj en Japanio, ofte rakontis al li la Meĝi-reformon kaj historion pri martirino Qiu Jin, unu el la pioniroj de la ĉina demokratia revolucio kaj agitis lian junan koron al progreso. Li ricevis elementan kaj mezgradan edukadon en Hankou (nun parto de la urbo-trio Wuhan). Wuhan estas heroo urbo de la popola insurekcio de 1911, kiu renversis, por ĉiam, la feŭdan regadon en Ĉinio, kaj okazis tie ankaŭ la striko de 1922. En la revolucio de 1927 heroe batalis la amasoj de Wuhan sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj juna Ŝecencz, membro de revolucia laborista sindikato, sin jetis en tiun batalon.

Esperanton Ŝecencz ekkonis surpaĝe de la progresema "Studenta Revuo" kaj tuj eklernis ĝin, kiam li hazarde trovis la lernolibron de J. C. O'Conner, en 1928. Kiel profesia angllingva interpretisto kaj amatora tradukanto de la angla literaturo, Ŝecencz penetris ankaŭ en Esperanton.

Post la malvenko de la revolucio en 1927 Ŝecencz fuĝis al la malgranda, provinca havenurbo Yichang. Tie li konatiĝis kun germanlingva instruistino S-ino M. Rhode el Germanio, kaj, bonŝance, ŝi estis esperantistino. Ŝi do fariĝis lia unua instruisto de Esperanto. La sekvantan jaron, en Yichang li aliĝis al la Ŝanhaja Esperanto-Asocio (ŜEA) kaj la junulo kun sentema koro verkis multe da poemoj.

Post sia reveno de Yichang al Hankou, Ŝecencz konatiĝis kun kelkaj esperantistoj en tiu urbo pere de la revuo "Verda Lumo", organo de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio. La aktivemaj samideanoj kune fondis en 1929 "Hankou Esperanto-Ligon de Amikeco" kun organo "Hela", inter kies membroj troviĝis Tikos, Yue Jia-xuan (Ĉoĉa), Ŝecencz kaj Fu Pin, kiuj aktive antaŭenpuŝis la ĉinan Esperanto-movadon en la sekvaj jaroj.

Dank' al la penlaboro de HELA, nova plivas-tigita "Hankou Esperanto-Asocio" (HEA) solene deklamis sian fondiĝon printempe de 1930. Ŝecencz kaj aliaj kunfondintoj estis elektitaj kiel komitatanoj de la asocio. Inter la estraranoj troviĝis ankaŭ japana esperantisto, bankoficisto Okamura.

HEA multe faris por disvastigi Esp-on kaj plifortigi la amikecon de la ĉina popolo kun la eksterlandaj. Ĝi fondis libroservon "Verda Stelo" kaj dimanĉan esperantolernejon kaj eldonis sian monatan revuon "La Espero", kiu konigis al la mondo la mizeran vivon de la popolo en la malnova Ĉinio. Ŝecencz verkis serion da artikoloj pri Esp-o por urbaj ĵurnaloj.

HEA varme gastigis eksterlandajn esperantistojn, ekz., dum sia per-esperanta vojaĝo, la fama

japana pentristo Oohasi Sukeĝiro (pseŭdonimo: Lendo) helpate de HEA, estis bone informita pri la batalanta Ĉinio kaj la heroa urbo Wuhan. La alia gasto de HEA estis franca laboristo A. Cucien Péraire, kiu, survoje de sia 30,000-kilometra por-esperanta vojaĝo per biciklo, atingis Wuhan vintre de 1930. Li estis amike bonvenigita kaj, invitive de HEA, kelkefoje prelegis al la Wuhan-aj esperantistoj.

Pro ĉiam intensiĝanta blanka teroro kaj persekuto fare de la reakcia reĝimo al la progresemoj, kaj fine, pro surpriza aresto de iuj komitatanoj, HEA devis ĉesigi sian agadon je la komenco de 1932.

2.

En 1931, Ŝecencz venis al Shanghai por daŭrigi sian studon pri literaturo kaj arto en alta lernejo. Tie li fondis kun aliaj verkistoj kaj literaturaj diletantoj la “Shanghai-an Literaturan Rondon” kaj eldonis sian unuan poemaron “La Ondoj”, kiu baldaŭ estis malpermesita de kuomintanga cenzuristo pro ĝia revolucia tendenco.

Kun la universitata diplomo Ŝecencz eniris, en 1934, la Filologian Kolegion de Yanĵing-universitato (nun Bejĵing-a Universitato). Inspirite de la “Proverbaro” de L. L. Zamenhof, li kompare analizis diverslandajn proverbojn kaj en 1936 publikigis sian verkon “Studo pri Proverboj”, la unuan teorian monografion pri tio en Ĉinio. Dum sia studenta vivo en Shanghai kaj Bejĵing Ŝecencz aktivis en Esperanta rondo. En Shanghai li konatiĝis kun famaj esperantistoj Bakin kaj A. A. Sofio, kaj en Bejĵing kun la pola esperantistino, verkistino S. Horose, kiu persone konis D-ron L. L. Zamenhof kaj edziniĝis al inĝeniero Hua Nanguī, unu el la plej fruaj ĉinaj esperantistoj. S. Horose estis fame konata en Ĉinio pro sia novelo “Amo kaj Devo”. La intima amikeco kaj fruktodona interkonsiliĝo pri Esperanto kaj literaturo inter ili pruvis la praktikan valoron de Esperanto por internacia akademia studo.

En la krizaj jaroj dum la invado de la japanaj militaristoj al Ĉinio kaj la reakcia regado de Jiang Jieshi (Ĉiang Kajŝek), Prof. Ŝecencz,



Prof. Ŝecencz en sia lego-ĉambro

rifuĝinte el sia okupita hejmloko, lektiis en pluraj universitatoj kaj institutoj en la malproksima urbo Kunming de la postfronta provinco Yunnan. Tie li, preninte plumon kiel armilon, partoprenis en la nacisava movado. Tie li eldonis sian duan poemaron “Kakto” por voki la popolon al batalo kontraŭ japana invado:

*Jen manoj verdaj
alte levitaj,
Simile al mil kaj mil pugnoj
jam batalpretaj;
aspekte tre fortikaj
kaj solidar-spiritaj
por lukto kontraŭ l' invadantaj malamikoj.*

La elstara ĉina revolucia intelektulo Prof. Wen Yiduo alte taksis la duan poemaron de Ŝecencz en sia antaŭparolo, nomante liajn poemojn “medikamentoj por la epoko”. Profesoro Ŝecencz aktive partoprenis en aktivadoj de la lokaj progresemaĵaj intelektuloj, kies reprezentanto estis lia kolego Prof. Wen Yiduo. Kiam mortis pro mizero la fama verkisto, esperantisto Wang Luyan, kiu tradukis multe da verkoj el la orienteŭropa literaturo pere de la internacia lingvo, Wen Yiduo kune kun Ŝecencz kaj aliaj iniciatis monkoklekton por helpado al mizeraj kaj

malsanaj verkistoj. Poste Prof. Wen Yiduo estis murdita en luma tago de la kuomintanga sekreta polico en 1946 surstrate. Ankaŭ Prof. Ĝecencz estis persekutita de la reakcia reĝimo.

La tria poemaro de Ĝecencz "Monotones", angllingve verkita, estis eldonita en 1948 en Shanghai kaj gajnis laŭdon de multaj angllingvaj verkistoj kaj profesoroj el Ĉinio, Anglio kaj Usono.

3.

Prof. Ĝecencz estas poligloto. Kiam mi vizitis lin lastatempe en lia kabineto, mi estis okulfrapita de diverslingvaj libroj kaj manuskriptoj en ĝi kaj demandis al li:

— Kiel lingvisto kaj poligloto, kiel vi opinias pri Esperanto?

— La angla lingvo estas mia profesia studobjekto kaj kun ĝi estas ligita mia tuta vivo, — respondis Prof. Ĝecencz, — tamen, mi firme kredas, ke Esperanto estas la plej bona internacia helplingvo el ĉiuj lingvoj, naciaj kaj artefaritaj, ne nur el la vidpunkto de lingvistiko, sed ankaŭ pro ĝia senduba praktika valoro, kiun mi persone jam spertis dum pli ol 50 jaroj.

Kvankam Prof. Ĝecencz havas multflankajn interesojn kaj multajn laborojn, tamen li neniam forlasis Esperanton. Li ĉeestis la Tutlandan Kunsidon pri Esperanta Laboro en 1963 en Beijing (Pekino). Rezulte de la kunsido estis

enkonduko de Esperanto en pli ol dekon da altaj lernejoj en la lando, inkluzive de tiu fakultato ĝis nun sub lia gvido. Li persone gvidis la tripersonan Esperantokatedron kaj kompilis duvoluman lernolibron.

Nun li tradukas hungaran ĉefverkon de I. Madách "La Tragedio de l' Homo", ĉefe pere de la Esperanta traduko de Kalocsay. Li opinias, ke ĝi superas ĉiujn alilingvajn tradukojn. Tio estas alia pruvo pri la lingva supereco kaj praktika valoro de nia internacia helplingvo Esperanto.


Ĝecencz estris la Wuhan-an Esperanto-Rondon. En lasta vintro li estis elektita kiel prezidanto de la Asocio de Fremdlanda Literaturo de Hubei-provinco, kaj en majo li estis elektita kiel prezidanto de la nove fondita Hubei Esperanto-Ligo. Li ĉeestis, antaŭ nelonge, la Tutlandan Planadan Konferencon pri Esploro de Eksterlanda Literaturo en Guangzhou (Kantono) kaj la konferencon de la provinca lingvistika asocio.

"Inspirite de la du konferencoj," diris Prof. Ĝecencz "mi des pli konscias la devon de la ĉinaj intelektuloj en la nova periodo. Mi devas dediĉi miajn restajn jarojn por la modernigo de nia patrio. Mi ankaŭ fidus la brilan estontecon de Esperanto, kiu ja povas multflanke servi al nia patrio kaj al la amikeco kaj interkompreno de la tutmondaj popoloj."

Prof. Ĝecencz diris, kion ĉinaj esperantistoj volas diri.



Esperantistoj de Wuhan fotitaj en 1963 post kunveno por memorigi la 104-an datrevenon de la naskiĝtago de L. L. Zamenhof. La 5-a de dekstre en la fronta vico estas Prof. Ĝecencz.



Jiang Zhifang



Unu el la poŝtmarkoj kun draka desegno plej frue emisiitaj de Qing-dinastio

WANG ZHAOJI:

Intervjuo kun Filatelisto

Jiang Zhifang

73-jara filatelisto Jiang Zhifang, emerita instruisto de la Hunan-a Universitato, estis premiita de la Ministerio de Poŝto kaj Telekomuniko de Ĉinio per honora diplomo, mono kaj tuta kompleto de la “Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko” pro tio, ke li oferis al la ŝtato grandan kvanton da raraj poŝtmarkoj. Lastatempe mi lin vizitis.

Sinjoro Jiang Zhifang loĝas en etaĝdomo ĉe la piedo de Yuelu-monto, pitoreskejo de la urbo Changsha. La maljuna sinjoro, kun radianta vizaĝo kaj longa arĝenta barbo, parolis sonore kaj vigle. Informiĝinte pri mia deziro, li ekparolis senĝene: “Mi kolektis poŝtmarkojn jam pli ol duonjarcenton, tamen tiel alta gloro estas ekster mia atendo. La Ministerio de Poŝto kaj Telekomuniko speciale okazigis por mi premi-

donan kunvenon en Changsha, kio ege min korusis. Tio estas kuraĝigo de la ŝtato ne nur por mi, sed ankaŭ por la filatelaj amatoroj de la tuta lando.”

Frue en la tempo de sia lernado kaj laborado eksterlande, Jiang Zhifang jam partoprenis en internaciaj poŝtmarkaj ekspozicioj okazigitaj en Belgio, Portugalio kaj Sovetunio kaj gajnis medalojn oran kaj arĝentan. Li kolektis ĉefe ĉinajn poŝtmarkojn kaj historiajn objektojn de poŝto, inkluzive de poŝtmarkoj emisiitaj de lokaj registaroj kaj eksterlandanoj en Ĉinio, en diversaj historiaj periodoj de 1878 ĝis 1949. Iuj el la pm. estas raraj en nia lando, ekzemple, pli ol 800 poŝtmarkoj kun drako plej frue emisiitaj de Qing-dinastio en 1878 p.K., ses tiam ekspeditaj kovertoj kun tiaj poŝtmarkoj stampitaj; la plej



Jiang Zhifang kaj lia filo rigardas la albumon de la poŝtmarkoj emisiitaj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Ĝi estis donita de la ŝtato al li kiel premio.

frua memoriga poŝtmarko-serio por memori la 60-an datrevenon de la naskotago de la imperiestra patrino Cixi de Qing-dinastio, emisiitaj en 1895 kaj tiam ekspeditaj kovertoj kun tiaj poŝtmarkoj stampitaj; aerpoŝtmarkoj emisiitaj en Xinjiang de nia lando en 1921 stampitaj per ligna stampilo kaj tiam ekspeditaj kovertoj kun tiaj poŝtmarkoj stampitaj; poŝtmarkoj emisiitaj de la Centra Laborista-Kamparana Demokratia Registaro establita de la Komunista Partio de Ĉinio en Jiangxi (Gianghi) kaj aliaj sovetaĵaj regionoj dum la tempo de 1927 ĝis 1931 kaj tiam ekspeditaj kovertoj kun tiaj poŝtmarkoj stampitaj, ktp. Li oferis al la ŝtato 5 kestojn da poŝtmarkoj kaj historiaj objektoj de poŝto. Rigardinte liajn filatelajn albumojn, filatelaj amatoroj lin admiris, dirante: “Jiang Zhifang vere estas nia filatela pioniro!”

Li diris al mi, ke frue en 1917, kiam li estis 10-jara, li jam komencis kolekti pm. Tiam lia patro ofte ricevis leterojn el Xianggang, sudo-orienta Azio kaj Francio, sur kiuj troviĝis diversaj belaj poŝtmarkoj. Iu instruisto kuraĝigis lin kolekti pm, dirante, ke filatelo ne nur estas inte-

resa, sed ankaŭ donos al la kolektantoj multajn sciojn. Ĉe la komenco, li ŝatis kolekti nur belajn, grandajn kaj triangulajn poŝtmarkojn de fremdaj landoj kaj Ĉinio. Poste, kiam multiĝis la poŝtmarkoj kolektiaj de li, li turnis sian atenton nur al ĉinaj poŝtmarkoj. Pli poste, li kolektis jam uzitajn kovertojn, poŝtkartojn kaj stampojn fari-tajn ekde Qing-dinastio.

“Kio estas la sekreto en via sukcesa filatelado?” Mi pretervole elmetis tiun demandon.

Tion aŭdinte, li diris kun rideto: Sekreto? Tre simple, nur tri punktoj: unue, ŝati poŝtmarkojn, due, ellerni koni la valoron de poŝtmarkoj, kaj trie, filateli fake sed ne ĉiuflanke. Ŝati poŝtmarkojn estas premiso por ĉiuj filatelistoj. Poŝtmarko estas ne nur atestaĵo de afranko, sed ankaŭ artaĵo kaj propagandaĵo, kiu surhavas multajn sciojn, el kiuj multaj estas nekonataj de ni. Ordigado kaj aprecado de poŝtmarkoj post laboro alportas al ni grandegan plezuron. Nur kiam la filatelistoj havas veran ŝaton al poŝtmarkoj, ili povas persistadi en sia kolektado.

Sinjoro Jiang rakontis interesajn okazintaĵojn en sia filatelado. En 1951, kiam li ĵus revenis de

eksterlando al Beijing li rimarkis, ke en la urbo troviĝas multaj vendejoj de malnovaj objektoj kaj libroj. Post laboro li iris al tiuj lokoj por serĉi poŝtmarkojn kaj historiajn objektojn pri poŝto. Iufoje, sur vendotablo de malnovaĵoj de malofte vizitata strateto li trovis atestajn paperojn por transporto de dokumentoj antaŭ la establo de poŝta servo de nia lando kaj kun ĝojo aĉetis ilin. Aliafoje, tuj post kiam li informiĝis, ke poŝtoŝtanco estas vendonta nove emisiitajn poŝtmarkojn de "mondeponado" kaj kun "surbrikaj bildoj de Orienta Han-dinastio", li eliris por ilin aĉeti. Tamen tiutage estis la Nacia Festo kaj ordinara poŝtoŝtanco ne vendis tiujn du seriojn de memorigaj poŝtmarkoj. Multaj filatelistoj foriris kun malplenaj manoj, dum li vizitis plurajn poŝtoŝtancojn, kaj finfine li aĉetis ilin kaj akiris emisi-tagajn kovertojn de tiuj poŝtmarkoj. De multaj jaroj, ĉiufoje kiam novaj poŝtmarkoj estis emisiitaj, li iris al poŝtoŝtanco por ekspedi leteron aŭ frankitan per nove emisiitaj poŝtmarkoj kaj konservis la koverton.


Pri ekspertizado de valoro de poŝtmarko, sinjoro Jiang diris, ke en tio oni devas taksu ne nur la prezon de kolektita pm, sed ankaŭ ĝian rarecon kaj valoron por scienca esplorado. Dum

sia restado en Parizo, li interŝanĝis poŝtmarkojn kun japana filatelisto. Ĉar li ne konis valoron de unu rara poŝtmarko, li preterlasis ĝin. Poste kiam li rimarkis tion, la poŝtmarko jam estis interŝanĝe donita al aliulo. Li tre bedaŭris pri tio kaj komprenis ke por ĝuste ekspertizi valoron de poŝtmarkoj, filatelisto devas posedi pli multe da scioj pri historio, geografio ktp.

Kiam nia interparolado iris arde, eniris junulo. Tiu estis laboristo de iu fabriko de la urbo Zhuzhou. Li estis amato de filatelo kaj speciale vizitis sinjoron Jiang por konsultado. Invitante la junulon al sidiĝo, sinjoro Jiang levis leterojn de sur la skribotablo kaj diris al mi, ke post la kunveno por premiodono, li akceptis nemalmultajn filatelajn diletantojn kaj ricevis multajn leterojn el diversaj lokoj de la tuta lando. Inter la skribintoj iuj estis liaj malnovaj filatelistoj-amikoj de dekoj da jaroj, pli multaj estis nekonataj junuloj. Krom gratulo al li, iuj ankaŭ sendis al li poŝtmarkojn kaj aliaj petis de li konsilon pri filatelo.

Sinjoro Jiang Zhifang nun resumas siajn spertojn akumulitajn en filatelo dum dekoj da jaroj kaj estas preta verki artikolon por miloj kaj miloj da amatoroj de filatelo.

La medaloj arĝenta (maldekstre) kaj orumita (meze) kaj pokalo kristala, gajnitaj de Jiang Zhifang en internaciaj poŝtmarkaj ekspozicioj



PRI UNU POSTLABORA LERNEJO DE LABORISTOJ KAJ OFICISTOJ

ĈIUVESPERE brilas lampoj en la instrua domo de la mezlernejo Dongfanghong en Nanjing (Nankino). Tie funkcias Postlabora Lernejo de Laboristoj kaj Oficistoj de Qinhuai-distrikto de Nanjing, kiu utiligas klasĉambrojn de la nomita mezlernejo vakantajn vespere por helpi junajn laboristojn en lernado de teknika kaj scienca scioj. Post deĵoro laboristoj tien rapidas, iuj eĉ ne havas tempon por sin lavi aŭ preni vespermanĝon, kaj haste eniras en sian klasĉambrojn laŭ indikiloj pendantaj ĉe la pordoj, sur kiuj skribiĝas “matematiko”, “fiziko”, “desegnado”, “elektronika tekniko” k.a. En 1973, en la tuta lernejo troviĝis 9 klasoj kun pli ol 500 kursanoj. Nun ĝi jam havas 66 klasojn kun pli ol 3,300 lernantoj, tamen tio ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon de la vastaj amasoj de junaj laboristoj.

La laboristoj elektas sian lernobjekton laŭ bezono de sia laboro. Ili diligente studas kaj rapide progresas. Nemalmultaj el ili fariĝis teknikistoj kaj estas laŭditaj de siaj fabrikoj.

Shen Xuguang, riparisto de la Elektromotora Fabriko de Nanjing, diris al ni, ke li same kiel multaj aliaj junuloj sentis malfacilecon pri la estonteco dum tirado de la “kvarpersona bando”. Li diris: “Nominale mi estis diplomito de elementa mezlernejo, efektive mi havis nur klarecon de elementlernejo. Mi, tiel juna, ne volas drivi sencele.” Apenaŭ denove ekfunkciis la nomita postlabora lernejo malgranda Shen tuj iris sin anonci por viziti ĝin. Sed li ne estis akceptita, ĉar la fabriko, kie li laboras, ne trovas sin en Qinhuai-distrikto. Kion fari? Li do senanonce vizitis la lernejon por aŭskulti lecion de matematiko. Kiam li unuafoje montris siajn ekzercojn al la instruisto, li donis al li leteron kune kun la ekzercoj, en kiu li petis la instruis-

ton akcepti lin kiel oficialan lernanton. Kor-tuŝite de lia lernemo, la instruisto kontentigis lian peton. En la pasintaj 6 jaroj li finplenumis studadon de la algebro, trigonometrio, geometrio, alta matematiko, desegnado de maŝinoj kaj elektronika tekniko. Nun li studas pri teknologio en alia postlabora lernejo. Li uzas preskaŭ sian tutan postlaboran tempon por studado.

En 1978, la Dua Plastaja Fabriko ricevis taskon transformi manipulitan maŝinon, kiu produktas poragrikulturajn plastajn membranojn, en maŝinon regatan per elektronika programo. La fabriko taskis tiun laboron al Lu Xiaoping kaj Xu Chengcheng, kiuj studas en la elektronika kurso de la nomita postlabora lernejo. La du knabegoj prenis tiun praktikan ŝancon kiel trezoron, diligente studis kaj fine atingis sukceson venkinte diversajn malfacilojn en projektado, plandesegnado kaj fabrikado. La Dua Malpezindustria Buroo de Nanjing okazigis kunvenon por teknika ekspertizo, en kiu provfunkcio de la maŝino pruvis, ke ĝia projektado estas racia kaj ĝia efiko bona. La teknika renovigo plialtigis la produktokvanton je 40% kaj ŝparis 50% de la laborfortoj.

La Riparejo de Motoraj Tricikloj estas malgranda fabriko kun iom pli ol 100 laboristoj kaj malnovaj teknikaj ekipaĵoj. En 1975 la fabriko sendis junan laboriston Zhang Guoqing al la nomita postlabora lernejo por studi meĥanikon. En la pasintaj du jaroj li, helpate de pluraj kunlernantoj de la lernejo, projektis kaj fabrikis por la fabriko kelkajn maŝinojn, solvis per ili ŝlosilan problemon de la produktado kaj multe altigis la produktivecon. Respondeculo de la nomita fabriko Wang Gang ĝoje diris: “Nia malgranda Zhang estis diplomito de elementa mezlernejo, sed nun kompetenta studento.” Ĉijare la fabriko

ESPERANTO-KURSO EN SHANGHAI

Post longa silentado esperantistoj en Shanghai iom ekvigligis. Je la 18-a de marto ĉi-jare, sub gvido de k-dino Ŝijimin fondiĝis Esperanto-kurso. Ĝi havas 14 lernantojn kaj regule funkcias du horojn en la vespero de ĉiu dimanĉo. Inter la kursanoj troviĝas 11 laboristoj kaj komizoj, 2 lernantinoj el mezlernejoj kaj 1 studento. Dume k-do Jefe lernigas ilin kanti Esperante. Krome k-dino Ŝijimin planas aranĝi Esperanto-ekspozicion antaŭ la fino de la kuranta jaro por montri al la publiko la fakton, ke Esperanto estas uzata kaj utila tra la mondo. Por tio ŝi petas, ke alilandaj Esp. organizaĵoj kaj samideanoj sendu al ŝi specimenojn de sia or-

gano aŭ bildkartoj. Ŝi recipokos per bildkartoj. Ŝi ankaŭ interesiĝas pri vortaroj nacilingva-Esperantaj aŭ Esperanto-nacilingvaj, literaturo, scienco, juro, muziko, mondpaco, kaj deziras ricevi materialojn pri tiuj temoj. Ŝia adreso: S-ino Ŝijimin, Changsha Lu, 149 Long, 32 Hao, Shanghai, Ĉinio.

LA WUHAN-A ESPERANTO-GRUPO OKAZIGIS LABORKUNVENON

La 20-an de majo kurantjare, la Wuhan-a Esperanto-grupo de Hubei-provinco okazigis kunvenon de siaj membroj. Oni elektis novan estraron kaj diskutis kiel disvolvi laboron en la estonteco. Tiu grupo fondiĝis en la jaro 1963 kaj faris multon por disvastigi Esperanton. La kunveno decidis fondi Esp. studrondon, aranĝi Esperanto-kurson, eldoni Esperantan periodaĵon kaj kulturaj Esperantaj labo-

rantojn por fari aktivan servon al modernigo de la patrolando.


LA 22-A AŬSTRALIA ESPERANTO KONGRESO

La 22-a Aŭstralia Esperanto Kongreso okazos ĉe la kolegio de Sankta Paŭlo en la Universitato de Sidnejo la 2-an—9-an de januaro, 1980. Krom la malfermo fare de eminentulo, ĉiuj aranĝoj estos prezentitaj en Esperanto kiel oficiala lingvo de la Asocio, sed oni provizos seminariojn kaj konversaciajn grupojn por altigi la lingvan nivelon de iuj kongresanoj kiuj ne plene posedas la internacian lingvon. Kutimaj aferkunvenoj de A.E.A. kaj aliaj Esperantaj organizaĵoj ankaŭ okazos, kaj oni prezentos pluraĵajn prelegojn, literaturajn erojn kaj diversajn distraĵojn. La Postkongreso okazos en Manly, apudmara antaŭurba loko de Sidnejo.

Eksterlandanoj rajtas aliĝi al la Kongreso senpage, sed ili devas scii, kiam ili atingos.

HUNGARA LERNEJA REFORMO FAVORAS ESPERANTON

Esperanto estos oficiale instruata en hungaraj lernejoj ekde 1981, en la kadro de reformoj en la sistemo de lernado de fremdaj lingvoj. Lernantoj rajtos elekti ĝin kiel trian lingvon dum la 3-a kaj 4-a lernojaroj en gimnazio. Esperanto jam estas instruata en hungaraj lernejoj, sed kutime ne oficiale, krom en kelkaj elementaj lernejoj.




La kursanoj kaj la gvidantino (meze)

sendis aliajn 15 junulojn al la postlabora lernejo por studi.

La progreso de la lernantoj estas neapartigebla de la diligenta laborado de la instruistoj. En la

lernejo laboras 9 profesiaj instruistoj kaj pli ol 50 kumula-instruistoj. Ili zorgeme preparas lekcionojn, redaktas lernomaterialojn kaj faras ĉion eblan por havigi al la lernantoj kiel eble plej multe da scioj en la mallonga lernotempo.



Nubomaro De Lushan-monto



Monto Lushan

de **JI XIUWEN**

LUSHAN estas unu el la famaj montoj de nia lando. Ĝi abrupte leviĝas sur ebenaĵo de norda Jiangxi (Gianghi) en orienta Ĉinio kaj estas vaste konata pro siaj variaj aspektoj en nebulo kaj nuboj.

La nebulo de Lushan ofte leviĝas malrapide de montpiedo kiel kuireja

fumo en la komenco, kaj baldaŭ ĝi disvastiĝas kaj kovras la domojn, kioskojn, arbojn kaj florojn sur la monto kvazaŭ malpeza gazo, tiel ke la pejzaĝo malklariĝas kvazaŭ sonĝa bildo. Kiam la nebulo densiĝas, ĝi formas mirindan vidaĵon de senlima maro de nuboj kaj ĉio cetera malklariĝas. Krom nebulo, tie

abundas ankaŭ pluvoj. Oni povas diri, ke dum la plejparto de la jaro Lushan estas en susura pluvo kaj estas malfacile akiri ŝancon por klare vidi la tutan monton. Tial cirkulas la diro "nevideblas la vera aspekto de Lushan", kiu estas ofte uzata por priskribi aferon malfacile koneblan.

Kvankam la tuta Lushan estas malfacile klare videbla, tamen ĝiaj pitoreskaj punktoj estas sufiĉe ĉarmaj. Por vidi la propran vizaĝon de Lushan, ĉinaj kaj eksterlandaj turistoj venadas al ĝi kaj montgrimpadas dum la tuta jaro.

Por pririgardi tiun monton, oni povas starti ĉe la bela urbo Guling ĉe la montotalio. Ĝi distancas de la urbo Jiujiang sub la monto apud Changjiang (Jangzi-rivero) je iom pli ol duhora veturado per aŭto. Antaŭ la naskiĝo de la nova Ĉinio en 1949, ĝi estis koncesia urbo de 26 landoj kaj havis ĉie malgrandajn vilaojn eŭropajn kun ruĝa tegmento kaj blankaj muroj. Nun tiuj konstruaĵoj jam servas al novaj mastroj. La loĝantoj de Lushan estas varme akceptantaj, kiel mastroj, turistojn el ĉiuj partoj de la mondo.

La monto Lushan kun cirkonferenco de pli ol 250 kilometroj havas 72 montpintojn kaj multajn pitoreskejojn, kiuj ĉefe dislokiĝas en la orienta kaj okcidenta valoj.

Oni povas veturi de Guling al la orienta valo laŭ monta ŝoseo. Apud tiu vojo altaj japanaj kriptomerioj (*Cryptomeria japonica*) kaj smeraldaj cipresoj formas arbaron, el kiu

iu parto etendiĝanta je pli ol dek kilometroj estas unu el la forstokulturejoj de tiu monto, kaj ĉie odoras agrabla aromo de rezino. Profunde en la arbaro troviĝas la famaj Tri Trezoraj Arboj, nome unu ginko kaj du kriptomerioj. Tiuj gigantaj arboj altas kiel ĉ. 10-etaĝa domo kaj estas tiel dikaj, ke tri homoj kun interkroĉitaj manoj ne povas ĉirkaŭbraki unu trunkon. Oni diras, ke ili estas plantitaj de iu bonzo antaŭ 1,500 jaroj.


Se vi iras malsupren de la arbejoj, vi povas aŭdi murmuron de akvofluo, kaj post mallonga iro vi povas veni al la akvofalo de la Nigradraka Lageto. La akvofalo konsistas el kvin maldikaj fluoj el rokfendoj, kiuj torentas malsupren kaj formas la lageton. Apude de ĝi estas la akvofalo de la Flavdraka Lago, kiu torentas malsupren de alta rokego kvazaŭ blanka silkajo pendanta en la aero. La lago sub tiu akvofalo estas profundega kaj eksterordinare malvarma. Legendo diras, ke flava drako vivas sur ĝia fundo. La monto Lushan havas multajn akvofalojn kaj profundajn lagetojn kun diversaj aspektoj, iuj el ili estas tre plaĉaj al la rigardo kaj aliaj estas majestaj. Ili povas

veki vastan asocion de ideoj. Nun al ili aldoniĝis la bela Lulin-lago kun klara akvo. Ĝi estas artefarita lago formita dank' al ŝtona baraĵo inter du montpintoj konstruita de la popola registaro en 1954. Tiu konstruo ne nur utiligas fontakvon de la monto sed ankaŭ plibeligas la pejzaĝon.

La ĉefa rigardindaĵo de la pejzaĝoj en la orienta valo estas Hanbokou. Tiu loko troviĝas je 1,210 metroj super la mara nivelo kun du montpintoj starantaj en ambaŭ flankoj. Ĉe tiu loko troviĝas bela domo kun teraso, kie oni povas oportune apreci la ĉirkaŭajn belajojn. Kiam fendiĝas la nuboj kaj oraj sunradioj pafiĝas malsupren, tuj prezentiĝas klara bildo sub la monto, kvazaŭ je levo de sceneja kurteno: oriente de la monto glimas la senlima akva vastaĵo de Boyang-lago, la plej granda lago de nia lando; sur la bordo bonorde kuŝas belaj kampoj, kaj vicoj da fabrikaj domoj elrigardas inter verdaj arboj. Nordoriente de Hanbokou troviĝas kvin montpintoj similaj al kvin maljunuloj sidantaj en diversaj pozoj. Sudokcidente estas la ĉefpinto de Lushan nomata Hanyangfeng. Ĝi altas je 1,543 metroj

Plezura Rigardo de Flugantaj Nuboj





Tianqiao

super la mara nivelo, kvankam ĝi estas vualita de nuboj, ĝi tamen tre imponas kiel ĉielskrapanta giganto.

La unua rigardinda loko en la okcidenta valo estas la flora avenuo, kiu jam transformiĝis en parkon kun animaloj kaj vegetaĵoj, kaj la dua artefarita lago konstruita en 1961. Tiu lago kun formo de violono produktadas sonojn de harpo, pro enflado de fontakvo.

Se vi iras supren de tiu loko, vi venas al ronda ŝtona pordo super

kiu troviĝas la skribita titolo "Fea Kaverno". Trapasinte la pordon vi vidas altan rokmuron el kiu etendiĝas rokego en formo de bufo. Starante sur ĝi en tempo kiam tie ruliĝas nuboj, oni sentas sin kvazaŭ ŝvebanta en aero.

La Fea Kaverno sin trovas efektive en rokmuro je centoj da paŝoj fore de la pordo. Ĝi estas natura kaverno kiu povas enteni centojn da homoj. Oni diras, ke en ĝi loĝadis Lu Dongbin, unu el la ok

feoj en ĉina popola legendo, kaj ĝi jam havas historion de mil jaroj. En la kaverno troviĝas "Gutanta Fonto", kiu gutadas senĉese dum la tuta jaro. Ĝia akvo estas malvarma kaj pura. Se oni infuzas Yunwu-teon de Lushan per ĝia akvo, oni povas ricevi aroman trinkaĵon.

Surgrimpinte la montpinton, oni povas vidi la Grandan kaj Malgrandan Ĉielajn Basenojn, kiuj estas fame konataj pro sia senvelka fonto, la altegan klifon Longshouya kun elstara rokego en formo de bovkapo, k.a.

Krom la mirindaj montpintoj kaj akvoj kaj la ŝanĝiĝemaj nuboj de Lushan, ankaŭ ĝia botanika ĝardeno en la sudoriento estas interesa loko. Ĝi kun areo de pli ol 290 hektaroj situas ĉe monttalo je pli ol 1,200 metroj super la mara nivelo. En ĝi kreskas ne nur ĉiaj kreskaĵoj troveblaj sur Lushan, sed ankaŭ multaj raraj floroj kaj arboj el pli ol 50 landoj. Kaj krome, oni kulturas tie ankaŭ altvalorajn drogplantojn kiel ginsengon, pseŭdoginsengon, gastrodon k.a. Yunwu-teo produktita de tiu loko estas la plej bona el la teoj produktitaj de Lushan. Ĝi estas unu el la dek plej famaj specoj de teo de nia lando. En la pasinteco, nur tre malgranda kvanto da ĝi estis produktita kaj ĝi estis uzata por prezenti al feŭdaj imperiestroj. Nun krom la teĝardeno en la botanika ĝardeno, pluraj montoj fariĝis kreskaĵoj de tiu speco de teo kaj sur ili aŭdiĝas kantado de la teo-rikoltantaj knabinoj.

Lushan havas ne nur pitoreskejojn kaj mildan klimaton, sed ankaŭ varman fonton, tial ĝi estas unu el la plej bonaj kuraĉlokoj kun altmonta klimato de nia lando. Ekde la jaro 1951, la ŝtato konstruigis sur ĝi sanatorion kaj ripozejojn en la ombroriĉaj orienta kaj okcidenta valoj de Guling kun multaj montfluoj.

Monto Lushan




La orienta valo de Guling

Vespera krepusko de Lushan





Montvojeto



Artefarita lago de Lulin






Nubomaro de Wangjiangting



Botanika Ġardeno

Rokmuro Longshou




ŜANGÎĜO DE MALNOVA PLAGITA REGIONO

RIGARDANTE fotojn antaŭ nelonge faritajn, mi kvazaŭ revenus al la Lixiahe-a Regiono de norda Jiangsu-provinco. Antaŭ miaj okuloj reaperis la gigantaj irigaciaj kaj drenaj stacioj, rektaj kanaloj, sur kiuj navigas vicoj kaj vicoj da ŝipoj plensarĝitaj per varoj, kaj aromaj tritik-kampoj. En la unuaj tagoj post kiam mi alvenis la lokon, mi eĉ ne povis kredi miajn okulojn: ĉu ĝi estas la regiono kiu multe suferis seriozajn katastrofojn? Sed post kiam mi finis mian 20-tagan viziton al ĝi, mi konkludis, ke tie ja okazis granda ŝanĝiĝo.

GRANDA IRIGACIA KAJ DRENA STACIO

En majo ĉijare, mi vizitis la Lixiahe-an Regionon. Veturinte de la antikva urbo Yangzhou orienten ĉirkaŭ 18 kilometrojn mi eniris en la gubernian urbon de Jiangdu de la nomita regiono. Inter verdaj arbaroj de la suda parto de la gubernia urbo troviĝas kvar grandaj konstruaĵoj. Ili estas la Jiangdu-a Akvoutiliga Pivota Konstruaĵo, komenco de la landfama konstruaĵo por konduki akvon de Changjiang (Jangzi)-rivero al la sekegeca nordo. La akvoutiliga konstruaĵo situanta sur la norda bordo de malsupra baseno de Changjiang estas ekipita ĉefe per kvar grandtipaj elektraj pumpstacioj kaj krome ankaŭ per 12 reguligaj kluzoj, du ŝipkluzoj, transformatora stacio, kanaloj k. a. Ĝi



La Jiangdu-a Pumpstacio

estas la plej granda irigacia kaj drena stacio de nia lando kun 33 grandaj pumpiloj, kiuj povas pumpi ĉiusekunde 473 kubmetrojn da akvo kaj dreni 1,200 kubmetrojn da akvo. En pluva sezono, ĝi povas ĝustatempe dreni superfluan akvon de Huaihe-rivero kaj inundan akvon de la Lixiahe-a Regiono en Changjiang-riveron. Dum sekeca sezono, ĝi povas konduki akvon de Changjiang-rivero al nordo laŭ la Granda Kanalo, ĝia irigacia areo atingis pli ol dek-milionojn da muoj (1 muo = 1/15 hektaro). Ĝi ne nur finis radikale la seriozajn sekegecon kaj inundiĝadon de la Lixiahe-a Regiono, sed ankaŭ kreis favoran kondiĉon por pluropaŝe konduki akvon de Changjiang-rivero al la sekegeca Nord-Ĉinia Ebenajo.

Guan Huaishan, respondeculo de la konstruaĵo, diris al mi, ke la konstruado de la kvar pumpstacioj estis komencita en decembro de 1961 kaj plenumita en 1977. Ĉiu el ili altas kiel deketaĝa domo kun duono sub akvo. La plej granda stacio N-ro 4 povas pumpi 210 tunojn da akvo en ĉiu sekundo, t. e. preskaŭ la totala kvanto de la aliaj tri stacioj. Krome oni instalas, por la stacio N-ro 3, maŝinaron kiu povas funkcii kiel elektra pumpilo kaj generatoro. La elektro produktita de ĝi povas kontentigi la bezonon de urbo kun ĉ. 150,000 loĝantoj.

Aŭtune de 1970, en la Lixiahe-a Regiono pluvadis dum 40 sinsekvaj tagoj, kaj tio serioze minacis la kreskon de rizplantoj. Dank' al tio ke la akvoutiliga konstruaĵo ĝustatempe drenis 900 milionojn da kubmetroj da superflua akvo, oni gajnis riĉan rikolton. En la pasinta jaro tie okazis sekegeco malofta en la pasintaj 70 jaroj. Tiam la kvar pumpstacioj sume pumpis 6,280 milionojn da kubmetroj da akvo, t. e. duoble tiom en Hongze-lago, kaj krome oni forkondukis 4,850 milionojn da kubmetroj da akvo. Per tio oni ne nur garantias la irigacion de kampoj kaj popolan vivobezonan akvoprovizon de la Lixiahe-a Regiono, sed ankaŭ liveras akvon al


vastaj regionoj de norda Jiangsu kaj Lianyungang por uzo en agrikulturo, industrio kaj vivo.

ANTIKA KANALO HODIAŬ


Forlasinte la Jiangdu-an Pumpstacion, mi veturis norden laŭ la orienta digo de la Granda Kanalo Beijing-Hangzhou-a. La rekta asfaltita ŝoseo borderita per arboj etendiĝas malproksimen. Sur la larĝigita Granda Kanalo maldekstre de la digo, de tempo al tempo aŭdiĝas fajfado de sirenoj de ŝipoj plensarĝitaj per varoj, dekstre de la digo estas vasta kamparo kun orflavaj tritiko kaj kolzo.

La Granda Kanado longa je 1,782 kilometroj komenciĝas de Beijing en la nordo kaj finiĝas ĉe Hangzhou en la sudo. Ĝi havas historion de pli ol 2,400 jaroj, estas unu el la grandaj antikvaj akvoutiligaj konstruaĵoj de nia lando kaj ankaŭ la plej granda antikva kanalo de la mondo. Ĝi trapasis de norde suden la okcidentan parton de la Lixiahe-a Regiono. En pluva sezono ĝi drenas superakvon de Huaihe-rivero al Changjiang, dum en senpluva sezono ĝi kondukas akvon de Huaihe-rivero por irigacii kampojn de la regiono. Sed, en la pasinteco, pro multfoja ŝanĝo de fluejo de Huanghe-rivero kaj inundo de Huaihe-rivero

La nove konstruita ŝipkluzo sur la kanalo



La larĝigita kanalo




la digo de la Granda Kanalo estas multfoje detruita. En pluvoza sezono ofte okazis inundaj katastrofoj pro breĉiĝo de la digoj. La plej serioza inundo okazis en 1931. La akvego de Huaihe-rivero breĉigis la orientan kaj okcidentan digojn de la Granda Kanalo en dekoj da lokoj, tiel ke pli ol 13 milionoj da muoj da agroj kaj pli ol 4 milionoj da homoj estis plagitaj kaj pli ol 78,000 homoj dronis.

En la gubernia urbo Gaoyou apud la kanalo iu respondeculo de loka akvomastruma institucio diris al mi: “La malfeliĉa historio de inundo antaŭlonge jam forpasis, hodiaŭ la antikva kanalo komencis sian novan vivon!” Frue en la jaro 1951, Prezidanto Mao Zedong jam instrukiis: “Nepre jungu Huaihe-riveron”, kaj la popolo de la Lixiahe-a Regiono, kiu multe suferis de inunda katastrofo, aktive partoprenis en jungado de Huaihe-rivero kaj la kanalo. Por ke Huaihe-rivero rekte fluu en maron, ili fosis en norda parto de Jiangsu-provinco la Subei-an Irigacian Trunkan Kanalon, kiu longas je 168 kilometroj. Por bridi atakon de torento de Huaihe-rivero dum ŝveliĝo al la okcidenta digo de la kanalo, ili konstruis Sanhe-kluzon kaj digon de Hongze-lago, Samtempe ili faris

plenamleksan riparadon al la kanalo. Unue oni ŝtopis kvin akvoellasejojn de la digo en la regiono kaj altigis kaj dikigis la digon. Poste, ili rektigis, larĝigis kaj dragis la kanalon kaj plantis sur ĝi arbojn. En iuj facile breĉiĝintaj partoj de la digo oni konstruis arbarajn terasojn kaj masonis ŝtonan taluson. Dank’ al tio, okazis al la digo neniu breĉiĝo dum 30 jaroj post la Liberiĝo.

Krome, ili ankaŭ konstruis multajn grandajn ŝipkluzojn kaj reguligajn kluzojn sur la kanalo kaj ordigis navigacian vojon, kio multe faciligis la navigadon. Bai Zaitian, vicestro de la trafika buroo de Gaoyou-gubernio, eklaboris kiel boatisto en sia aĝo de 15 jaroj. Li diris al mi: En la komenca periodo post la Liberiĝo, la malnova kanalo fariĝis mallarĝa, malprofunda kaj zigzaga pro detruado, kaj nenavigebla en certa tempo de la jaro pro manko de akvo. En pluvabunda sezono, granda rapideco de la fluo malfaciligis navigacion. Tiam transporta kvanto de la kanalo estis malgranda ankaŭ pro tio ke la boatoj estis kompare malgrandaj kaj plejparto de ili estis lignaj velŝipoj movataj per remado kaj trenado. Post dragado kaj riparado al la kanalo, ĝia surfaco larĝiĝis de 10-30 metroj ĝis

Nova kanalo ĉe Zhennanwei de Xinhua-gubernio



45-70 metroj, kaj ĝi estas navigebla por kelkcent-tuna ŝipo kaj 1,000-2,000-tuna remorkaro anstataŭ por 10-20-tuna ligna ŝipo antaŭ la Liberiĝo. Samtempe pro funkcio de la Jiangdu-a Pumpstacio, la kanalo fariĝis navigebla tutjare eĉ kiam sekigis Huaihe-rivero. Hodiaŭ la antikva kanalo jam rejuniĝis kaj fariĝis granda aorto interliganta la Sudon kaj Nordon de Ĉinio.

RIĈA LANDO DE GRENO

Ĉar la Lixiahe-a Regiono kun formo de kaldrono situas en la malsupra baseno de Huaihe-rivero, okcidente de ĝi estas la antikva kanalo, kies akvonivelo estas je pli ol 2-3 metroj pli alta ol la tersurfaco de la Lixiahe-a Regiono, kaj oriente de ĝi estas la Flava Maro, kies tajdo estas je 1-2 metroj pli alta ol ĝia tersurfaco, tial al ĝi ofte okazis inundo, sekeco kaj salalkaliĝo en la historio.

Post la Liberiĝo, por radikale malebligi tiajn naturajn katastrofojn, tiea laboranta popolo ĉiujare persistis en akvomastroma konstruado kaj atingis grandan sukceson en konstruado de

*Xinhua-gubernio inundita
de superakvo en 1931*



la Subei-a Irigacia Trunka Kanalo kaj la kvar rivervojoj, kiuj kondukas akvon en maron, kaj mardigo kun longeco de 749 kilometroj kaj kontraŭtajda kluzo, en ordigado de la kanalo kaj konstruado de la Jiangdu-a Akvoutiliga Pivota Konstruaĵo. Tiuj konstruaĵoj ne nur radikale finis la inundplagan historion de la loko, sed ankaŭ kreis bonan kondiĉon por turni la Lixiahe-an Regionon en riĉan grenproduktejon.

En la Zhaoguan-a irigacia regiono de Jiangdu-gubernio kaj la Nanguan-a irigacia regiono de Gaoyou-gubernio mi vidis, ke kamparanoj konstruis nombron da hidroelektraj stacioj, akvokondukaj kanaloj kaj tunelaj kluzoj, utiligante la favoran altan situon de la kanalo, kaj per tio turnis la lokon en memflue irigaciatan. Laŭ statistiko, la areo de memflue irigaciataj kampoj apud la kanalo jam atingis 100,000 hektarojn. Krome, pro tio, ke la Jiangdu-a Pumpstacio povas provizi la lokon per sufiĉe da akvo, ŝanĝiĝis la tiea kultura sistemo. Pasinte tie oni havis nur unu rikolton ĉiujare, sed nun oni havas du rikoltojn de tritiko kaj rizo ĉiujare, kaj nova kultura sistemo de tri rikoltoj de tritiko, rizo kaj rizo ĉiujare estas disvastigata en granda areo. La grena produktokvanto plimultiĝis kvaroble kompare kun tiu de la komenca periodo post la Liberiĝo.

En Zhennanwei de Zhuhong-komunumo de Xinghua-gubernio, mi vidis la novan fizionomion de la akvoza regiono de Lixiahe: malgrandaj terpecoj dividitaj de multaj laĝetoj jam ŝanĝiĝis en vastan kamparon, sur kiu interplektiĝas la nove konstruitaj trunkaj kaj branĉaj kanaloj borderitaj per arboj. Ĉe la fino de la trunka kanalo staras irigaciaj-drenaj stacioj kaj reguligaj kluzoj. Sur la kampo estas ora tritiko kaj kolzoj plenaj de guŝoj. Ĉie prezentiĝas pejzaĝo de akvoriĉa lando sude de Changjiang-rivero. Nia akompananto kamarado Hu, kiu laboras en la akvomastroma buroo de la gubernio, diris al mi, ke antaŭe Xinghua-gubernio estis la plej malalta loko de Lixiahe, kie ofte okazis seriozaj sekegeco kaj inundo. Sed dank' al akvoutiliga konstruado oni nun povas ĝustatempe dreni inundakvon en pluvabundaj tagoj kaj garantii irigaciadon, eĉ se ne falas

pluvo en 100 sinsekvaj tagoj. En la pasinta jaro la gubernio suferis de ekstrema sekegeco, tamen ĝia hektara produktokvanto de greno atingis 8,400 kilogramojn, kaj oni liveris al la ŝtato pli ol 285,000 tunojn da grenoj.

GIGANTA ŜANĜIGO DE SALA-ALKALA TERO

Ankaŭ la ŝanĝigo de la marborda regiono de Lixiahe profunde impresis min. Pasinte, tie troviĝis pli ol 333,000 hektaroj da sala-alkala sterila tero, tamen nun estas bazo multe produktanta kotonon de Jianguo-provinco.

Mi prenu Xinjie-komunumon de Dongtai-gubernio kiel ekzemplon. Antaŭe 60% de la tuta agraro de la komunumo estis sala-alkala kaj kamparanoj devis vivteni sin per preparo de salo, fiŝkapto kaj vendo de fragmito. Ekde la sepdekaj jaroj, ili decidis reformi la sala-alkalan teron. Unue, ili fosis en la tuta komunumo 5 trunkajn kanalojn, kiuj fluas de sude norden, 29 irigaciajn-drenajn kanalojn, kiuj fluas de oriente okcidenten, konstruis aron da pumpstacioj por konduki Changjiang-an akvon por forlavi la salalkalon. Poste ili aldonis al la sala-alkalaj kampoj organiksterkon, kaj kreskigis sur ili plantojn por verda sterko. Tiamaniere ĉiuj tiaj terpecoj de la komunumo estis reformitaj. En la pasinta jaro, la hektara produktokvanto de sensemigita kotonon de la tuta komunumo atingis 1943 kilogramojn kaj la hektara produktokvanto de greno atingis 6443 kilogramojn.


En la komenca periodo post la Liberiĝo, 80% de la tero de sepa taĉmento de Bayi-brigado de Sancang-komunumo, kiun mi vizitis, estis sala-

alkala kaj dispecigita de 27 kanaletoj kaj 31 lagetoj. En la jaro 1958, komunumanoj komencis fosi novajn kanalojn, plenigi malnovajn lagetojn kaj ebenigi agrarojn. Dum la pasintaj dek jaroj, ili faris sintezan reformon al la sala-alkala tero, kaj turnis ĝin en fekundajn kampojn. En la pasinta jaro, la hektara produktokvanto de sensemigita kotonon atingis 2,640 kilogramojn, kaj tiu de greno atingis 11,940 kilogramojn.

Kun disvolviĝo de produkto, ankaŭ vivo de la komunumanoj pliboniĝis. Antaŭ la Liberiĝo la taĉmento havis 31 familiojn, inter kiuj 12 vivtenis sin per almozpetado. Hodiaŭ la tuta taĉmento havas 60 familiojn. Mi vizitis la familion de Ding Chaowen. Antaŭ la Liberiĝo, 5 membroj de lia familio migris aliloken por almozpetado. Nur post la Liberiĝo ili revenis al sia hejmloko. Nun, la tuta familio havas 6 membrojn: Lia maljuna edzino estas ankoraŭ tre sana, liaj filoj kaj du filinoj laboras en la taĉmento, kaj unu filino vizitas lernejon. La familio havas sian propran domon kun sep ĉambroj kaj ĉiujare havas superfluajn grenon kaj monon. En la pasinta jaro, al la familio restis 1,300 juanoj el la enspezoj post ĉiuj pagoj necesaj. Mi vizitis aliajn familiojn kaj ankaŭ ili kontentas pri sia nuna vivo. Laŭdire, ĉiuj familioj de la taĉmento havas superfluajn grenon kaj monon, triono de la familioj havas po deponitan sumon de pli ol 5,000 juanoj en banko kaj du familioj eĉ deponis po 10,000 juanojn. Krome, la komunumanoj ĝuas senpagajn kuracadon, vestofaradon, hartondadon kaj prilaboradon de greno. Ĉio ĉi tio multe altigis la vivnivelon de la komunumanoj. La komunumanoj tre ĝojas pro la boniĝo de la vivo.



SURAKVA KLINIKO



*Surakva klinika boato de la
Changjiang-a Naviga Administracio*

IUTAGE maristo Guo Yuanguan sur bargo en Changjiang (Jangzi), la plej granda rivero de Ĉinio, suferis de febro, kaj oni telefone vokis al surborda administrejo por peti kurachelpon.

Tio ja estas ordinara afero, tamen estis mirinde, ke nur post 15 minutoj jam venis kuracisto en boato.

Nun sur la rivero jam funkcias la unua surakva kliniko antaŭnelonge fondita de Ĉinio.

Tuj post sia alveno la kuracisto ekzamenis la pacienton, faris injekton al li kaj donis al li ses

specojn de medikamentoj por redukti la febron, inflamon kaj tuson.

Post plenumo de la kuraca servo li revenis al sia boato. La paciento pagis nenium groŝon, ĉar la ĉinaj laboristoj ĝuas senpagan kuracadon.

Por doni kuracan servon al maristoj, oni jam faris multajn klopodojn. Laŭlonge de la rivero la ŝtato fondis 7 hospitalojn kaj 31 kuracejojn kun 1,800 malsanulaj litoj, kaj pli ol 100 sanprotektajn kaj epidemiopreventajn staciojn. En ĉiu pasaĝera aŭ vara ŝipo funkcias kuracejo kun profesia kuracisto aŭ laboristo-higienisto. Kiam la

XIN KE:

ĈINIO PARTOPRENIS EN LA UNUA TERGLOBA EKSPERIMENTO DE TAEP

LA 23-an de marto, 1979, la du ĉinaj oceanografiaj ŝipoj "Shijian" kaj "Xiangyanghong 09", partoprenintaj en la Unua Tergloba Eksperimento de TAEP (Tergloba Atmosfera Esplora Programo), triumfe revenis al Huangpu-haveno de Guangzhou (Kantono). Svingante kolorajn flagojn, tamtamante kaj tamburante, oni varme bonvenigis la heroojn de la ekspedicio. Oni laŭdis ilin pro tio, ke ili faris pene-man esploradon sur la vastega Pacifiko pli ol 90 tagnoktojn kaj akiris

grandan kvanton da multfakaj valoraj materialoj.

La Unua Tergloba Eksperimento de TAEP estas internacia scienca esploro, senprecedence grandskala. En ĝi partoprenis 147 landoj kaj regionoj. Ĝi aplikis novajn rimedojn de observado kaj komunikado. Ĝi ludas gravan rolon en la esplorado de atmosfera strukturo kaj mara-aera interfluado, en altigo de la prognoza precizeco pri hidrometeologiaj fenomenoj kaj en la



Kuracoservo sur la boato

ŝipo albordiĝas, ili povas ricevi medikamentojn ĉe la sanprotekta stacio. En la pasinteco, se maristoj en bargo malsaniĝis, ili devis surbordiĝi per boato speciale alsendita de la surborda administrado. Tiam ili povis ricevi kuracadon nur post pli ol du horoj. Tro longe por urĝa helpo!

Tiu surakva kuracoserva boato de la Changjiang-a Naviga Administracio navigas laŭ la linio inter la urbetoj Junshan kaj Yangluo kun longeco de pli ol 60 kilometroj, en la meza baseno de la rivero apud la havenurbo Wuhan. Sur ĝi estas aparatoj por radiografado, kardiografado,

ultrasona ekzameno kaj kemia analizado kaj aliaj medicinaj instrumentoj, provizitaj de la Ĝenerala Hospitalo de la Changjiang-a Naviga Administracio, kaj la lasta elektis 19 el siaj medicinaj laborantoj por la kliniko. Ili sin dividis en tri grupojn, kiuj servas alterne unu semajnon en la ŝipo, kaj du semajnojn en kuracejoj de maristoj sur la bordo.

Tage la klinika boato navigas sur la rivero por kuraca servo kaj vespere ĝi ankras en la haveno Wuhan. La servoregiono estas dividita en ses sektorojn, kaj ĉiutage la boato navigas en unu sektoro farante servon de 8-9 horoj. Ĝi povas kuraci malsanulojn suferantajn je malvarmumo, tuso, astmo, artrito, reŭmatismo, stomakaj kaj aliaj ordinaraj malsanoj.

La kuracistoj ne nur donas urĝan helpon al akutaj malsanuloj, sed ankaŭ faras ĉiujare ĝeneralan ekzamenadon al pli ol 23,000 laboristoj sur 1,600 ŝipoj de la Wuhan-a Naviga Administracio. Samtempe oni donas al ili medikamentojn por preventi malvarmumon. Krome ili ankaŭ faras al ili injektadon kontraŭ tetano pro tio ke ili ofte kaŭzas al si traŭmon dum laborado.


La dua kuracoserva boato estos konstruita kaj ekfunkcios en la jaro 1980, kaj instaligĝos en ĝi krome dentkuraca ĉambro kaj radiotelefonio.

disvolvado de scienc-teknika interŝanĝado.


En la jaro 1978, Ĉinio decidis partopreni en tiu esplorado. Post pli ol unumonata preparo, la tuta membraro de la du ŝipoj kaj la sciencaj kaj teknikaj laborantoj el pli ol 20 unuoj de la tuta lando ekveturis laŭplane al Pacifiko.

La du ŝipoj trapasis Mindoro-markolon de la Filipinoj kaj navigaciis orienten laŭ la latituda linio je 5° N.. Kaŭzite de la ekvatora alizeo, leviĝis ondegoj, kaj tangis

la ŝipoj. Tio daŭris pli ol dek tagojn. Sed ĉiuj persistis sur siaj postenoj kaj la ŝipoj daŭrigis la veturadon al la celloko. Kiam ili atingis la sudan Pacifikon, tie ilin atakis eĉ pli fortaj vento kaj ondoj, kaj foje la montrilo de anemometro indikis 11 gradojn. La furiozaj ruloj jen puŝis la ŝipojn, kvazaŭ foliojn, alten, jen ĵetis ilin suben. Subite rompiĝis semafora fosto sur la pruo kaj poste forŝiriĝis kontraŭonda tabulo de la babordo, la ŝipo iom post iom perdis ekvilibron. En la



Ĉina oceanografia ŝipo "Shijian" ekveturas de Huangpu-rivero.



*Ĉina oceanografia ŝipo
"Xiangyanghong 09"*

kriza momento, ĉiuj unuanime kaj rapide faris riparadon. Dong Wanyin, la unua vicŝipestro de "Shijian", jam pli ol kvindek-jara, aplombe direktadis la aktivadon. Spitante longajn distancon kaj tempo-daŭron kaj multecon de telegramoj, la kvin telegrafistoj laboris tagnokte kaj eminente plenumis la telekomunan taskon. Scienca laboranto Lin Bozheng sensperta pri oceana esploro ankoraŭ ne kutimiĝis al marveturo, tamen li firme persistis en la observado.

Post luktado kontraŭ la ventego kaj ondoj, la laborantoj de la ŝipoj devis esti provataj de terura varmo. La suno rostis kaj la temperaturo sur la ferdeko atingis 63 gradojn C.. Sed ili laboris kun plena viglo kaj akiris ĝojgajn fruktojn en sciencaj esploroj. El la akvo profunda je 4,200 metroj, la geologia grupo prenis kolonan specimenon longan je 4.3 metroj, kaj kreis plej altan landan rekordon tiuflanke. Laŭ koncernaj materialoj, oni povas scii el tiel longa specimeno 400,000-jaran historion de sedimento en tiu maro. La hidrologia grupo konstatis per mezuro, ke la marakvo profunda je 1,200 metroj fluas je 0.48 marmejlo en ĉiu horo, tio havas gravan scienca valoron en taksado pri la ĝusteco de materialo akirita per mezurado pri akvofluo per du

aparatoj en la sama tempo. En nia lando, oni la unuan fojon mezuris la temperaturon de marakvo profunda je 3,124 metroj, per pinto-fermita termometro farita de nia lando mem. La sukcesa uzado de la supre menciita termometro en la maro profunda je 3,000 metroj pruvis, ke tiu-speca termometro povas elteni la premon de 300 atmosferoj. Pro la atingoj propramane akiritaj, ĉiuj forte emociiĝis!

Pro la longedaŭra laborado, ofte okazis perturbo de grandaj kaj malgrandaj maŝinoj. Precipe la difektiĝo de teodolito, ne riparebla portempe, multe malfaciligis la navigacion. Kion fari? La navigacia linio kaj labora regiono povis esti ekzamenataj nur astronomie. La kamaradoj de la oceano-navigacia fako do prenis sur sin la taskon. Frumatene, kiam super Pacifiko regis ankoraŭ mallumo, kun sekstanto ili jam deĵoris sur la signalferdeko malgraŭ vento kaj ondoj, elektis la stelon plej proksiman al la zenito kiel koordinaton, kaj poste kiam videbliĝis la horizonto, ili trovis la pozicion de la ŝipoj. Tage, por ĝuste ekzameni la ŝipo-pozicion, ili ofte laboradis senriproze. Ili samtempe faris mezuradon laŭ la sunopozicio kaj reciproke korektis unu alies ekartojn. Dank' al tio, en pli ol du monatoj, la navigaciado de la ŝipoj kaj la ĝusteco de la materialoj estas garantiitaj.

En la pli ol tri monatoj, laŭ la internaciaj decidoj kaj postuloj, ili faris observadon de alta-aeraj kaj surmaraj meteoj, oceanaj hidrologio, geologio, biologio kaj aliaj, enketadis pri 83 punktoj, sendis al la komunika centro de la Monda Meteorologia Organizo 617 observajn telegramojn kaj 165 magnetobendojn, registritajn en alta aero, kaj sukcese plenumis la taskon de la unua observo-periodo. Poste ili faros la duan esploran navigacion.

MAJE de la kuranta jaro okazis en Beijing (Pekiĥo) la Kvara Sportkunveno de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, en kiu partoprenis ĉ. 3,000 sportistoj.

La atingoj de la sportkunveno montris, ke la sporto de la tuta armeo atingis novan pli altan nivelon. Dum la inaŭguro, oni prezentis brilajn militsportajn programerojn. Paraŝutistoj prezentis ses programerojn inkluzive de manpremo de paraŝutistoj en aero el du aviadiloj, fikspunkta paraŝutado kun fumstrio kaj formiĝo de stelo el dek paraŝutistoj en la aero. Aparte interesaj estis la du kolonoj formiĝintaj el kvar paraŝutistoj starantaj unu sur alia en la aero, kiuj fine disiĝis kaj surteriĝis. Tiu prezentaĵo rikoltis varman aplaŭdacion de miloj kaj miloj da rigardantoj. Komenciĝis prezentado de dislokado de minoj per raketo. Aŭdiĝis tondra bruoj kaj raketo kun longeco de pli ol du metroj flugis en la aeron

Motorcikloj flugas tra rom-pita ponto.



kun flama vosto. La kapo de la raketo baldaŭ krevis kaj la internaj kontraŭtankaj minoj disfalis kun paraŝutoj en terenon malproksiman je pli ol mil metroj. La mino-meta veturilo sukcese faris unuopan, serian kaj salvan pafadon. Rapidantaj tankoj demonstris pafadon kaj ĉiuj obusoj de ĝi trafis la celaĵojn. Krome, oni ankaŭ prezentis rajdodon de motorcikloj.

Estis serene antaŭtagmeze de la oka de majo. Ĉe la pafejo okazis konkurso de 60 malrapidaj kaj rapidaj pafadoj per etkalibra norma pistolo por virinoj. La spektantoj fikse rigardadis la cirklaĵajn tabulojn. Post la pafbruoj, la ĉefjuĝisto ĝoje proklamis: "Sportistino Gao Qing de la Armea Oficejo rompis, per 593 cirkloj, la mondan rekordon de 592 cirkloj kreitan de sovetunia pafis-

LUOCAO:

LA KVARA SPORTKUNVENO DE ĈPLA

tino G. Korsun!" Tuj eksplodis varma manklakado. Multaj homoj kuris al Gao Qing kaj gratulis ŝin firme premante ŝiajn manojn. Tiu 22-jara knabino armeaniĝis en 1977 kaj laboras kiel flegistino en iu hospitalo. Nur mallongan tempon ŝi okupiĝis pri la sporto de pafado. Kiam ŝi lernis en mezlernejo, ŝi nur akiris la sperton de tri pafadoj per fusilo. Post armeaniĝo ŝi partoprenis en trejnado kaj konkurso de la trupo kaj nur en lasta decembro ŝi komencis sin ekzerci per etkalibra norma pistolo por virinoj. Sed dank' al sia diligenta ekzercado, ŝi atingis brilan sukceson. Kiam restis al ŝi nur 5 kugloj en la konkurso, ŝi trovis ke ŝi povos superi la mondan rekordon, nur se ŝi gajnos 50 cirklojn per ili. Ŝi pafis aplombe, senhezite kaj kuraĝe, kaj ĉiu el tiuj kugloj trafis la centron de la celotabulo kaj gajnis 10 cirklojn.

En tiu konkurso, alia sportistino Du Ningsheng de la Nanjing-aj (Nankin-aj) Trupoj sukcesis atingi la saman nivelon de la monda rekordo.

En la dekelkaj tagoj, ĉiuj konkursoj finiĝis per bonaj atingoj. 9 sportistoj rompis 13 landajn rekordojn de 8 disciplinoj de la kvar sportobranĉoj atletiko, naĝo, halterlevo kaj pafado. Ankaŭ sportistoj de korbopilko, flugpilko, piedpilko, volano, tabloteniso kaj manpilko faris intensajn konkursojn kaj montris pli altan nivelon.

Dum la ferma ceremonio, la prezidantaro de la Kvara Sportkunveno de ĈPLA disdonis premiojn al la rekordokreintoj kaj iliaj trejnistoj, la gajnintoj de la honoraj lokoj de grupaj konkursoj kaj 78 avangardaj unuoj de sporta aktivado.



Sportistino Gao Qing, kiu rompis la mondan rekordon de pafado por etkalibra norma pistolo por virinoj.

Konkurso inter la Virinaj Flugpilkaĵ Teamoj de la Beijing-aj kaj Nanjing-aj Trupoj



GIĈETO

(Daŭrigo)

DE tiu tago, iom ŝanĝiĝis mia sinteno al la laboro. Estis hazarde, ke en la sekvanta tago iu pasaĝero volis aĉeti bileton por Dalian kaj mi diris al li la koston: "29.9 juanoj." Anstataŭ enŝovi monon, li turnis al mi sian oreton kaj demandis: "Kiom?" Mi ripetis la respondon, kaj temen li demandis refoje: "Kiom?" Mi laŭte rediris, li tamen ankoraŭ ne enŝovis monon.

Se tio okazus en la pasinteco, mi certe jam flamiĝus, sed tiutage mi decidis teni mian bonhumorecon, kiel ajn multfoje li demandos. Fine mi skribis la koston sur papero kaj montris ĝin al li, nur tiam li elprenis monon por pagi.

Ricevinte la bileton li staradis en hezito, anstataŭ tuj foriri.

"Kion vi ankoraŭ volas, kamarado?" mi demandis.

Subite li sin klinis al la giĉeto kaj diris danke: "Kiel bona vi estas, kamaradino!" Li fingre montris sian oreton kaj diris: "Miaj oretoj malsaniĝis kaj ne povas bone kapti la vortojn. . . ĉiuj flamiĝas kontraŭ mi pro tio. . . Dankojn al vi!" Tion dirante li elprenis grandan freŝe ruĝan pomon el sia mansako kaj ĝin donis al mi per ambaŭ manoj. Tion vidante, la apude starantaj pasaĝeroj tuj komencis manklaki.

Verdire, de la tago kiam mi unuafoje eklaboris ĉe la giĉeto, mi neniam sentis tian intimecon inter mi kaj la pasaĝeroj. Rifuzante la pomon per manogesto, mi sentis ke malklariĝis miaj okuloj.

De tiam mi fariĝis pli rigora al mi mem. Mi trovis ke multaj el la pasaĝeroj ne povas bone aŭdi. Por koni la kaŭzon, mi mem ludis rolon de pasaĝero ekster la giĉeto kaj trovis, ke pro bruado en la biletvenda halo, oni ne povas klare aŭdi la parolojn el la giĉeto, kvankam la vortoj direktataj al la servantoj en la giĉeto estas tre klare aŭdeblaj.

Tiu eltrovo forte skuis min. Mi sentis ĉagrenon dum pluraj tagoj. Kiel erarigas subjektivismo, ke mi prenis multajn pasaĝerojn, kiuj ne povis klare aŭdi min, kiel petolemulojn!

Estas mirinde, ke plimultiĝis miaj ideoj por servi la pasaĝerojn, kiam ŝanĝiĝis mia penso. Mi skribis la facile misaŭdeblajn nomojn de stacioj sur kartojn por ilin montri en neceso. La pasaĝeroj venas de ĉiuj partoj de nia patrolando kaj unu stacia nomo estas prononcata de ili en dekelkaj malsamaj manieroj. Mi do klopodis por ellerni diversajn dialektojn.

Tion eksciinte, biletvendistino malgranda Zhu komencis min helpi meminciate. Ŝi estas la plej juna en nia biletvendejo kaj estas vere entuziasma. Ŝi havas lertan buŝon kaj iom scipovas paroli la Shanghai-an kaj Guangdong-an dialektojn, pro tio ke ŝi partoprenis en aktivado de propaganda taĉmento. Ŝi instruadis min ĉiutage. Kiam ni estis liberaj, ni nin ekzercis pri manipulado de abako, desegnis skizajn mapojn de la fervojoj de la tuta lando, skribis la distancon kaj biletkoston de la grandaj stacioj de la tuta lando sur slipojn kaj ilin pendigis sur la muroj por parkerigi en liberaj minutoj. Tiam mi vere absorbiĝis pri tiu afero kaj parkerigadis matene post la vekiĝo, nokte antaŭ la endormiĝo kaj en aŭtobuso post la dejorado.

Antaŭe, kiam mi kaj malgranda Lu havis liberan tempon, ni aŭ vizitis kinejon aŭ iris promeni sur la bordo de Weihe-rivero. Sed nun, kiam ni renkontiĝis, mi nur petis ke li helpu min en parkerigo de distancoj kaj biletkostoj. Li demandis kaj mi respondis. Mia patrino eksentis domaĝon kaj diris: "Ĉu vi perdis la prudenton, knabino?! Malfacile akirinte tempon por ripozo, vi senfine babilas pri 'kilometroj'!"

Tiamaniere forpasis tri monatoj kaj mia biletvendo iris pli kaj pli facile. Je la fino de la jaro mi jam vendis 200,000 biletojn sen eraro.

Iutage, Sekretario Lei venis al mi kun dika stako da leteroj kaj diris: “Malgranda Han, jen leteroj por vi!” Mia koro ekbategis de timo, ĉar mi pensis, ke eble denove okazis eraro pro mia neglekto. Sed post tralego de ili mi trovis, ke ili estas leteroj por laŭdi min. Efektive tiuj leteroj estis ricevitaj antaŭ longe, tamen Sekretario Lei estas vere fidela al la principoj, ke li neniam laŭdis min senpripense.

Sekretario Lei diris ĝoje: “Malgranda Han, oni laŭdis vin en letero, ke vi fariĝis ‘komputero’! Vi estas tiel forgesema en ĉiutagaj aferoj, tamen tiel bone memoras la tarifon! Ehe, certe en tio estas iom da filozofio!”

Mi ekridetis honteme.

Malgranda Zhu ekfrapis min kaj ekridegis.

II

Tiam malgranda Han ĉesis rakonti. Mi rimarkis ke sur la tablo troviĝas taso, mi tuj plenigis ĝin per akvo kaj ĝin donis al ŝi.

“Ĉu vi ne renkontis malfacilon?” subite demandis maljuna Shi. Malgranda Han silentis momenton kaj daŭrigis poste:

Tio okazis en marto de 1976, kiam la pravo kaj malpravo de multaj aferoj estis inversitaj. Iu el nia stacio kritikis Sekretarion Lei per dazibaŭ-o dirante, ke li estas iranto de la kapitalisma vojo. Mi ne povis akcepti tian opinion, kaj sekve oni komencis klopodi por min kulpigi.

Kaj ĉe mia peto pri aliĝo al la Komunista Junulara Ligo eksplodis la konflikto. La KJL-grupo de la biletvendejo konsentis akcepti min en la Ligon kaj transdonis mian peton pri aliĝo al la filio por diskuto. Neatendite, la sekretario de la KJL-komitato de la stacio kaŝe movis kelkajn personojn agi kontraŭ mi. Nenion sciinte pri tio, mi iris al la kunveno de la filio kun ekscitiĝo, kunportante notlibron por noti la elmetotajn kritikojn pri mi por korekti miajn erarojn en la estonto. Sed mi aŭskultis malpli ol dek minutojn kaj jam ne plu povis daŭrigi la notadon. La unua kritikis min, ke mi “ne havas klaran vidon kaj ne kuraĝas stari kontraŭ la fluo”, la dua kritikis, ke mi “ne metas politikon en komandon kaj klopodas por fariĝi burĝa spe-



cialisto sen socialisma konscio”, kaj la tria, eĉ pli furioza, postulis ke mi respondu la demandon, ĉu Lei Deming lasis min legi leteron de laboristo de la Ŝtal-fabriko de Lueyang. Li diris: “Tiu letero ne multe diferencas de kontraŭrevolucia kalumnia letero. Ĉu la nunaj moroj estas malbonaj? La specialaj revoluciaj moroj ja malplaaĉas al tiuj uloj! Tio, ke Lei Deming edukas vin per tia letero, estas atesto pri lia krima klopodo por kontraŭrevolucia restaŭro!” Kaj li diris krome, ke mi estas “vera lakeo de iranto de la kapitalisma vojo”!

Ĉu tio ne estis organizita kaj preparita sieĝo? Mi tremadis de indigno. Kelkaj membroj de la Ligo spite stariĝis por min senkulpigi. Malgranda Zhu indigne diris montrante ilin: “Vi kulpigis fratinton Han pri tio kaj tio, sed laŭ mia opinio, vi nur envias ŝin! Pasaĝeroj laŭdis ŝin, kaj ignoris vin. Vi ĉagreniĝis! Tute laŭmerite, mortu de ĉagreno!” Ŝi deziris, ke ili mortu de ĉagreno, sed apenaŭ finiĝis ŝia parolo, ŝi mem komencis plori de ĉagreno.

En la sekvanta mateno, aperis ĉe la pordo de la biletvendejo pluraj dazibaŭ-oj, kiuj ĉiuj atakis min kaj ankaŭ iom tuŝis malgrandan Zhu. Unu

el ili skribis, ke ni havas nigran subtenanton. Iu pentris karikaturon, kiu prezentis knabinon kun mallongaj harligoj, kiu parkerigadas tarifon kun levita kapo, kies frunto ricevis altan tuberon pro neatendita frapiĝo kontraŭ ŝtonego. Supre vidiĝis la vortoj "Misdirekte". Kaj post ŝi iu kun longaj harligoj kuraĝigis ŝin dirante: "Ne erare! Supren, frapiĝu!"

Mi vere ne plu povis tion toleri, mi ĉagreniĝis. Mi ja ne povis konvinkiĝi, ke eĉ servado al la popolo estas kulpo! Kia maljusto! Mi tiam rigardis nenium, fine mi min turnis, kuris en la biletvendejon, prenis la kartojn plenajn de staciaj nomoj kaj forte ilin ĵetis sur la plankon. Mi eĉ deziris ilin treti per la piedoj, sed mi levis la kapon kaj vidis, ke Sekretario Lei envenas.

Vere hontinde. La larmoj, kiujn mi tenis en la okuloj, tiam fariĝis neniel reteneblaj kaj falis kiel perloj de rompita koliero. Mi tremis tutkorpe kaj post longa momento mi ekploreĝis. Tretante la kartojn mi diris: "Mi neniam plu faros tian stultajon! Neniam. Mi laboregis diligente kiel bovo, kaj ricevis vipadon rekompence. . . Meritite! Meritite! Ja mi mem volis esti bovo!"

Sekretario Lei diris nenion, li nur meditis fumante. Nur kiam mia ploro mildiĝis, li diris kviete sen eklevo de siaj palpebroj: "Malgranda Han, ĉu vi ne opinias, ke ĉiuj devas aplaŭdi vin pro viaj bonaj servoj?"

Liaj vortoj forte pikis miajn orelojn. Mi levis la kapon.

"Se vi vere tiel pensis, mi devas diri al vi, ke vi eraris!" Sekretario Lei diris en la sama nehasteco: "Se la afero estus tiel simpla, ĉiu el la centoj da milionoj da popolanoj fariĝus Lei Feng.*"

Kaj poste Sekretario Lei levis unu post alia la kartojn ĵetitajn de mi kaj zorge forviŝis la polvon sur ili, dirante: "Vi. . . ne volas fari stultajon, ne volas servi kiel 'bovo'. Malgranda Han, mi rakontu al vi historion:

"Antaŭ la Liberiĝo, iu eminenta revoluciulo sin ĵetis en la revolucion, faris la Longan Marŝon grimpante neĝmontaron kaj vadante tra marĉoza herbejo kaj travivis neimageblajn suferojn, por la liberiĝo de milionoj da sklavoj.

"Post la Liberiĝo, li neniam volis ripozon kaj vivĝuon kaj ĉiam diligente laboris por la popolo. Li laboris kun nepriskribebla streĉeco, tiel en printempo kaj somero kiel en aŭtuno kaj vintro, tiel en la tagoj kiel en la noktoj. Oni diras, ke la lampo en lia laborĉambro neniam estingiĝis.

"Lia pozicio estis tre alta, sed li ankoraŭ portis flikitajn vestojn, iris inter ordinarajn laboristojn kaj kamparanojn kaj manĝis kune kun ili pekli-tan rapon kaj maizan panon. Li ja ripozis tro malmulte.

"Tial la laborantoj ĉe li kune skribis dazibaŭ-on postulantan, ke li prizorgu sian sanon. Li legis la dazibaŭ-on kaj modeste akceptis ilian kritikon. Sed li diris samtempe, ke li estas jam grandaĝa kaj devas labori pli multe por la Partio.



“Li diris, ke li estas bovo de la popolo. Efektive, li servis entuziasme dum la tuta vivo kiel ‘bovo’ de la popolo. De multaj jaroj, li ĉiam prenis sur sin la plej lacigajn, plej penigajn kaj plej pezajn ŝarĝojn. Diligente, sen ĝeniĝo pro kritikoj li plugis kaj semis feliĉon verŝante sian sangon el la koro, por la popolo. . .

“Fine li malsaniĝis pro penado. Tre grava estis lia malsano. Kaj dum lia malsano, cirkulis multaj onidiroj inter la okcent milionoj da popolanoj. Ĉiuj tiuj onidiroj enhavas la saman aserton, ke lia malsano estis kuracita, kiel ajn komplikaj kaj zigzagaj vojoj estis trairitaj—malgranda Han, kiel multe la amasoj amas lin kaj kiel ili deziris. . .”

Subite lia voĉo ekstremitis. Mi stuporiĝis.

“Efektive,” Sekretario Lei daŭrigis post paŭzo por sin regi, “lia malsano pli kaj pli serioziĝis. Li sciis, ke lia vivo jam venis al la lastaj tagoj kaj li ankoraŭ pli pene laboris por la popolo. Tiel li malfortiĝis, ke eĉ paroli estis malfacile por li, tamen pripensante la morgaŭon de la popolo li ekkantis ‘La Internacion’ pretervole. Tiel forte la malsano lin doloris, tamen li diris al la kuracistoj kaj flegistoj: ‘Zorgu pri la aliaj, mi ne bezonas. . .’ Poste—poste kiam disvastiĝis la informo pri lia forpaso, la montoj kaj riveroj de la patrolando ekploregis kune kun la okcent milionoj da popolanoj. Ĉiuj diris. . . diris, ke tia homo neniam povas forpasi. . .”

Mi ekstaris kun larmoj kaj interrompis lian rakonton: “Ho, ne diru plu! Sekretario Lei. . .”

Li ne levis sian kapon kaj rigardis malsupren.

“. . . Mi scias, ke li estis nia Ĉefministro! Nia Ĉefministro Zhou!”

Sekretario Lei ekmovis siajn lipojn, li tamen ne povis plu diri kaj liaj okuloj pleniĝis de brilaj larmoj. Li kovris la vizaĝon per la manoj kaj post longa momento aŭdiĝis voĉo kvazaŭ de tre malproksime: “Malgranda Han, vi ankoraŭ ne komprenas, mi membriĝis al la Partio antaŭ 30 jaroj, tamen ĉiufoje kiam mi pensis pri Ĉefministro Zhou, mi sentas, ke mi ankoraŭ ne. . . partianiĝis.”

Mi viŝis la okulojn per naztuko kaj ekaŭdis vokon “Sekretario Lei” ĉe la pordo, kiam mi

ekvolis ion diri. Tio estis malgranda Zhu. Ŝi aŭskultadis, oni ne scias de kiam, ĉe la pordo. Ŝi alkuris kaj prenis la manojn de Sekretario Lei, kaj larmoj ruliĝis malsupren laŭ la vangoj. Subite ŝi sin turnis kaj jetis al mi: “Fratino Han, mi, ankaŭ mi servos kiel ‘bovo’ de la popolo.”

Mi ĉirkaŭprenis ŝin. Ni ambaŭ ekploris.

.

Post tiu tago, mi kvazaŭ subite fariĝis multe pli grandaĝa. Mi estis neparolema en la pasinteco, kaj en la sekvantaj tagoj mi parolis eĉ ankoraŭ pli malmulte. Ĉiuj diris, ke mi ŝanĝiĝis. Ankaŭ malgranda Zhu ŝanĝiĝis de tiu tago. Ŝi estis knabino gaja kaj kantema, sed en tiuj tagoj ŝi ĉiam silentadis kaj meditadis sidante. Mi sciis, ke ŝi akumulis en si energion! Kiel profunda estis tiu skuo al ni sur nia ĵus komencita vojo de vivo. Ni kaŝe faris konkursan planon por kompari, kiu el ni pli multe pensos por la pasaĝeroj kaj kiu progresos pli rapide en la profesia laboro. Ni atente observis la ĝeneralajn leĝojn kaj postulojn de la pasaĝeroj kaj trovis ilian timon pri tri aferoj, nome atingi la celitan stacion je maloportuna horo, forlasinte la trajnon ne povi tuj kapti necesan trafikilon kaj ne povi trovi deziratajn institucion, hotelon kaj cellokon. Ni do parkerigis, je plia paŝo, la startajn kaj alvenajn horojn de ĉiuj pasaĝeraj trajnoj ĉe ĉiuj stacioj sub nia fervoja administracio, la startajn kaj alvenajn horojn de aŭtobusoj de la ĉefaj urboj en nia provinco kaj ankaŭ la vojojn al la ĉefaj hospitaloj, fabrikoj, minejoj, institutoj kaj lernejoj de Beijing, Shanghai kaj Xi’an. Kvankam tiuj aferoj estas ekster la servo de biletvendisto, tamen mi volonte plenumus ĉion bezonatan de la pasaĝeroj, eĉ prenis sur min la tutan laboron de la Informejo kaj Disaŭdiga Ĉambro.

Mi kaj malgranda Lu interkonsentis, ke mi vizitu lian hejmon je la Unua de Majo. La 28-an de aprilo, li venis al mia hejmo por vidi min. Kiam li enpaŝis la pordon, li vidis, ke mi estis parkeriganta la horaron de vagonaroj kun vizaĝo al la muro, kaj lia mieno tuj malheliĝis kvazaŭ fera bulo.

“Kio okazis al vi, malgranda Lu?”

Li diris nenion kaj nur ĉagrene sidadis. Fine lia pacienco elĉerpigis pro demandado kaj li diris: “Yunan, ne plu parkerigu tion!”

“Kial ne?”

“Ĉu vi pensas, ke mi ne informiĝis!” li iom ekscitiĝis. “Ĉe via stacio oni publikigis tiel multe da dazibaŭ-oj kontraŭ vi. Tiel multe vi cerbumis, sed pro tio vi ricevis la kromnomon ‘maniulino por burĝa specialisteco’, ĉu estas inde?”

“Malgranda Lu —”

“Hodiaŭ,” li interrompis min, en la kunveno de la subadministracio por interŝanĝi spertojn pri ‘kulturado de la kontraŭflua spirito de junuloj’ la sekretario de via KJL-Komitato elmetis vin kiel ‘negativan tipon’. Vi ankoraŭ ne aŭdis pri tio, sed la tuta subadministracio jam scias tion!”

Mi stuporis momenton kaj diris: “Malgranda Lu, lasu la opiniojn de aliaj, sed pripensu mem, ĉu mia vojo estas ĝusta aŭ ne?”

“Kion utilas pripenso, ja ankaŭ ĵurnaloj diras la samon kiel ili.” Li diris indigne.

“Ĉu la diroj de la ĵurnaloj estas tute pravaj?”

“Pravaj aŭ ne pravaj!” malgranda Lu kriis kun larĝigitaj okuloj, “sed kiu ne agos laŭ la vortoj de la ĵurnaloj, tiu trafos malfeliĉon!”

Verdire, li neniam tiel krude kondukis antaŭ mi, kvankam li estas malpacienca. Mi rigardadis lin kun larĝigitaj okuloj kaj tre ĉagreniĝis mia koro. Mi diris: “Malgranda Lu, aŭskultu min, mi scias, ke mia agmaniero kaŭzas al vi tre grandan premon —”

Abrupte li stariĝis kaj diris spiregante: “Pre-mo al mi?! Kion mi timas? Jen mia korpo de pli ol cent ĝinoj (1 ĝino=0.5 kg.), ĝin prenu, kiu ĝin volas!” tion dirante li dolore frapis per la pugno, “mi ne volas vidi, ke vi — Yunan!” . . . Li subite sin turnis, ĵetis la pordoklapegon kaj forkuris mordante la lipon.

Ne malproksime post nia domo estas la grua bordejo de Weihe-rivero, libera kaj kvieta. En

tiu posttagmezo, mi promenis sola laŭ la bordo kun senordaj pensoj en la kapo. Vidante la rondajn ŝtonetojn ĉe la bordo, mi ekmemoris mian konkurson kun malgranda Lu pri ĵetado de ŝtonetoj en la riveron, kaj vidante la grandan soforon sub la baraĵo mi ekmemoris, ke sub ĝi mi rakontis al li miajn konfliktojn kun pasaĝeroj. En tiu tempo, mi nur plendis pri malracieco de pasaĝeroj. Li nur ridetis je tio kaj nenion diris pri ĝia praveco. . .

Ju pli multe mi pensis, des pli forte mi ĉagreniĝis, mi do simple nenion rigardis kaj nenion pripensis, kaj nur vagis sencele. Fine mi subite levis la kapon kaj vidis la malproksiman Qinling-montaron kovratan de pale blua nebulo kaj Weishui-riveron orienten torentantan, kies fino estas nevidebla. La fluo en la sunbrilo prezentas variajn kolorojn. En malproksimo, kie miksiĝis la akvo kaj la ĉielo, ŝvebis kelkaj agloj apenaŭ videblaj. . . vere bele!

Estas mirinde, ke la vastego de la naturo povas iafaje ankaŭ serenigi la homan koron. Ordinare mi ne estas tiel pensema, sed en tiu momento la vortoj longa historia fluo, revolucia afero, homa idealo. . . subite, oni ne scias kiel, elsaltis kaj plenigis mian cerbon. Mi longe staradis, rigardadis kaj meditadis. Tio ja estis montoj kaj rivero de la patrolando! Kaj sur ili disŝutiĝis la cindro de Ĉefministro Zhou. Lia koro krevis de pezaj zorgoj por la popolo, por ni la juna generacio. Kaj nun lia brila spirito ankoraŭ nutras kaj varmigas nin. Li havis nek riĉaĵon nek infanojn kaj eĉ oferis siajn cindrojn al la nobla kredo kaj bela celaĵo, al la popolo kaj la patrolando! Mi pensis pri Ĉefministro Zhou, ja kian subpremecon mi ne povus elteni kaj kian egoisman konsideron mi ne povus forĵeti? . . .

Mi ĉesis mediti. En unu spiro mi kuris al la biletvendejo, kaj survoje mi laŭte diris al mi en la koro: “Neeble, neeble, neeble! Estas neeble, por mi ne lasi min bone servi al la popolo!”

(Daŭrigota)

* *Lei Feng estas eminenta batalanto de la Ĉina Popola Liberiga Armeo, kiu oferis sian vivon en plenumado de sia tasko en 1962. Dum sia vivo li montris noblan komunisman spiriton kaj per tio donis lernindan ekzemplon por la tuta ĉina popolo.*



Arto Eminente, Amikeco Profunda

*Ĉina baletistino prezentas
bukedon al Margot Fonteyn.*

de WU JINGSHU

MARGOT Fonteyn disradias kiel brila stelo sur la baleta scenejo de la Okcidento kaj estas admirata de ĉiulandaj amantoj de tiu arto. Ŝi faris grandan kontribuon al la baletado de Britio, estis nomumita direktorino de la Reĝa Akademio de Dancoj jam en 1954 kaj ricevis diversajn honorojn.

Por fari aŭtobiografian televidan filmon, ŝi faris privatan viziton al nia lando en la lasta decembro. Laŭ ŝia plano, tiu filmo komenciĝos per historiaj notoj pri baletado en la palaco Versajlo, la fonto de tiu arto, preparolos la plej fruajn baletajn pintajn ŝuojn montratajn en la Kopenhaga Muzeo kaj prezentos la hodiaŭon de tiu arto. Ŝi intencas solvi sian historion en tiu de la disvolviĝo de baletado. M. Fonteyn komencis lerni dancarton en la ĉina urbo Shanghai (Ŝanhajo), rememo-

rante pri sia artista vivo ŝi ne preterlasos sian neforgeseblan infanecon pasigitan en Ĉinio.

Kvankam 45 jaroj jam forpasis post ŝia foriro de Ĉinio, tamen Margot Fonteyn sukcesis, je ĉi-foja reveno, trovi la lokon kie ŝi antaŭe lernis baleton kaj la teatron kie ŝi prezentis dancon, dank' al varma helpo de ĉinaj amikoj. Revizito al tiuj lokoj vekis ĉe ŝi multajn pensojn kaj vibrigis forte la kordojn de ŝia animo. Ŝi diris emocie: "Mi trovis la lokon, kie mi iam lernis; nun ĝi estas sidejo de la Geknaba Teatrotrupo kaj en ĝia klasĉambro troviĝas apogilo por dancoekzerco!" Informiĝinte pri enradikiĝo kaj ĝermado de baletado en Ĉinio, ŝi sentis apartan ĝojon. Ŝi diris: "La iniciativoj de baletado en la palaco Versajlo ja ne atendis, ke baletado transportiĝos al la Oriento." Tial ŝi de-

cidis ke en la filmo aperu prezentado de ĉinaj lernantoj, kaj ŝi iris al la Beijing-a (Pekina) Dancoakademio por rigardi lernadon kaj ekzercadon kaj kapti, per kamero, kelkajn signifohavajn scenojn. Ŝi volis diri al la popolo de la mondo, ke baletado jam ricevis novajn fruktojn en Ĉinio kaj la lernejo jam verkis kaj prezentis, per sia personaro, tutan baleton "Knabino kun Alu-metoj", adaptaĵon de la samtitola fabelo de Andersen.

Por pli bone koni la artajn atingojn de M. Fonteyn, mi foliumis periodaĵojn kaj librojn pri danco kaj ŝian aŭtobiografion. Estas tute ne hazarde, ke ŝi fariĝis elstara baletistino kaj ricevis diversajn honorojn. Ŝi estas artistino kiu povas prezenti diversajn pensojn kaj sentojn per dancaj figuroj kaj esprimi figurajn enhavojn per elstara tek-



En kunsido



Doni subskribon al baletistinoj por memoro

niko. En Shanghai ŝi diris foje kaj refoje: “Kvankam tekniko estas grava, tamen ĝi ne estas la plej signifa kaj plej interesa afero, la plej grava afero estas la artaj figuroj kaj perfekta arta efekto, kaj tekniko servas nur por esprimi la pensojn kaj sentojn de la personoj, por esprimi poezion.” Ŝia prezentado vere pruvis tion. En la filmo “Romeo kaj Julieto”, la dancmovo de M. Fonteyn fluis kiel versoj kaj ŝi donis al la spektantoj neforgeseblan impreson, kvankam ŝi ne uzis multajn altajn teknikojn.

La arta talento de Fonteyn montriĝas ankaŭ en tio, ke ŝia danco estas karakterizita per altaj takteco kaj melodieco. Ŝiaj dancaĵoj kaj kombinado, la delikataj movoj de ŝiaj brakoj kaj kapo kaj ŝiaj riĉaj sentesprimoj ĉiuj devenas de la muziko kaj bone esprimas la pensojn kaj sentojn de la komponisto. Alivorte, ŝia danco estas tute harmonia kun la muziko.

Tre eminenta estas la arto de Margot Fonteyn. Ŝi tre lertas en ludado de klasikaj baletoj kiel “Giselle”, “Cigna Lago” kaj “La Dormanta Belulino”, kaj precipe en ludado de la rolo de princino Aŭroro en la lasta baletto ŝi estas rigardata de la Okcidento kiel la plej perfekta el la nuntempaj aktorinoj. Kaj krome, ŝi atingis ankoraŭ pli elstarajn sukcesojn en ludado de nove kreitaj baletoj, donante malsamajn karakterojn al diversaj roloj, kaj lasis neforgeseblan impreson al la rigardantoj.

Dum ŝia lasta vizito al Ĉinio, ŝi plenumis streĉan laboron de filmado kaj krome ankaŭ elpemis tempon por pririgardi danclernejojn en Beijing kaj Shanghai kaj interparolis kun iliaj instruistoj kaj lernantoj. Pro subfosado de la “kvarpersona bando” al la edukado pri dancarto, la nivelo de tiuj lernejoj

malaltiĝis, tamen M. Fonteyn varme kuraĝigis ilin. Ŝi opiniis, ke la lernantoj de Shanghai “plaĉe dancis kaj bone faris la movojn kaj sentesprimojn”. Ŝi diris, ke la lernantoj de Beijing “ricevis bonan trejnadon, iliaj movoj estas relative netaj kaj la movoj de la manoj, kapo, trunko kaj koksoj estas relative bonaj...” Ŝi ŝatas ĉinajn naciajn dancojn kaj fotis tibetan dancon. Ŝi diris, ke “en plenumo de naciaj dancoj, ĉinaj dancistoj sin movadas gracie kaj sentoplene, atentante pri la mangestoj kaj bone prezentante la karakterojn de la roloj.” Ŝi ankaŭ malkaŝe montris rimarkitajn mankojn en nia instruado de dancarto kaj sincere faris proponojn por ilin forigi.

En la sama tago, kiam M. Fonteyn alvenis al Beijing, ŝi rigardis prezentadon de baleta trupo. La prezentitaj klasikaĵoj estis malpermesitaj de la “kvarpersona bando” en la pasintaj pli ol dek jaroj kaj ĵus resurscenigitaj. M. Fonteyn kuraĝigis la aktorojn: “La trupo atingis konsiderindan nivelon kaj la dua sceno de “Cigna Lago” montris certan stilon kaj estas tre bela...” Post la rigardado, ŝi kunsidis kun la aktoroj de la trupo kaj varme elmetis multajn valorajn opiniojn pri konstruado de la trupo. Ŝi opiniis, ke la trupo urĝe bezonas pli grandan repertuaron, la hodiaŭaj verkoj devas pli bone ligiĝi kun la aktuala vivo, la baleta trupo devas prezenti, antaŭ ĉio, klasikajn baletojn, ĉar ili estas normoj por mezuri la nivelon de baletoj, tamen estas pli grave prezenti siajn proprajn verkojn pri la reala vivo, ĉar nur tiamaniere la arto povas akiri pli grandan esprimivon.

Per ĉifoja vizitado, M. Fonteyn starigis amikecon kun ĉinaj dancistoj. Ĉina fama dancistino Dai Ailian persone ŝin akceptis ĉe la




Vizito al baletŝuo-farejo

aerodromo. M. Fonteyn lernis dancon infanaĝe en Ĉinio kaj Dai Ailian lernis dancon dum sia knabineco en Britio, kaj pro tiu hazarda simileco ili renkontiĝis kvazaŭ malnovaj amikinoj. Kaj dum interparolo ili ektrovis, ke ambaŭ instruistoj de ili estis disĉiploj de la majstro de baletoj Cecchetti, kaj multaj famaj dancistoj estas iliaj komunaj konatoj, kaj pro tio ili trovis pli multajn komunajn temojn. Ankaŭ aliaj dancistoj kiel la direktorino de la Beijing-a Dancoakademio Chen Jinqing kaj ĝia vicedirektoro Jia Zuoguang kaj la direktorino de la Shanghai-a Dancoakademio Yang Rongrong varme akceptis ŝin. Ŝi kaj ŝiaj ĉinaj kolegoj kunestis amike kaj harmonie. Dum la kunestado kun ŝi, la ĉinaj dancistoj multe lernis de ŝi kaj profunde sentis ŝian profundan amon al la ĉina popolo.

Nin plej kortuŝis la adiaŭado ĉe la aerodromo. Kiam M. Fonteyn informiĝis en interparolo, ke ni ŝatas la dueton prezentitan de ŝi en

la tria sceno de “Cigna Lago”, ŝi tuj proponis: “Se vi volus, mi povas nun ĝin instrui al vi.” En la komenco ni sentis, ke estas ne dece tiel ĝeni ŝin je la adiaŭo, tamen ŝi proponis trifoje kaj fine ni decidis prunti ripozan ĉambron de la aerodromo por lerni dancon. Tiam estis froste kaj ni sentis malvarmon eĉ en surtuto, sed M. Fonteyn demetis senhezite sian surtuton kaj nin instruis portante nur ĉemizon kaj ĵupon. Ŝi entuziasme demonstris, dum sia klarigado, svingante sian kruron kaj farante turniĝon, kaj surmetis sian surtuton kaj diris “adiaŭ” al ni, nur kiam la aviadilo estis jam ekflugonta. Ŝia amika sentimento profunde nin kortuŝis.

Kiel artistino, M. Fonteyn estas laŭdinda ne nur pro siaj multflankaj talentoj, sed ankaŭ pro sia bela moralo. Kvankam ŝia vizito estis mallonga, tamen ŝiaj intimaj paroloj, trafikaj opinioj, ŝia aminda figuro de arto, kaj precipe ŝia amikeco al la ĉina popolo, ĉiam restos en nia cerbo.



DALI EN LA TRIA MONATO

de ZHANG WEI

Ilustritaĵoj de YIN FENGGE

EN la tria monato lunkalendara, pompas kameliaj floroj kaj prosperas fazeoloj kaj tritiko en Dali de Yunnan, kie koncentre loĝas baj-oj de nia lando. La monto Cangshan kun ankoraŭ nedegelinta neĝo, simile al bravulo en arĝenta kiraso, majeste staras apud la kvieta lago Erhai. La nebulo ruĝigita de la aŭroro kvazaŭ brila

ŝvebanta rubando anoncas la feston de la baj-popolo "Foiron de la Tria Monato".

Frumatene jam aŭdiĝis bruoj sur la ŝoseo: junuloj algalopis sur ĉevaloj, geonkloj alveturis per aŭtobusoj kaj knabinoj alvenis per bicikloj.

Sur la placo kun diametro de pluraj kilometroj, blankaj tendoj, ruĝtolaj rubandoj, koloraj flagoj kaj balonoj kaj buntaj naciaj kostumoj kune formis ĉarman maron de floroj. Mi moviĝis kunpremte en torento de jubilaj amasoj. Ĉirkaŭe oni prezentis drakan kaj leonan dancojn, ludis operon kaj kantis popolkantojn kun tintil-hava bastono — tradiciajn programerojn ŝatatajn de la baj-oj. Subite iu ekkriis en la amaso: "Kant-fraŭlino! Jen kant-fraŭlino! Petu ŝin kant!" "Kantu! Kantu!" multaj kriis aprobe. Kelkaj knabinoj ĉirkaŭpremantaj unu alian fronte de mi kluke ridadis kovrante al si la buŝon! Ornamentaj per arĝentaj orelingoj kaj bluaj kaptukoj, ili portis ruĝan substofitan jaketon kaj elegantan ombrelon en mano. La knabino staranta ĉe la flanko ruĝiĝis kaj mallevis la kapon. Mi klare rimarkis, ke ŝi havas belgrajnnon sur la mentono. Ŝi subite levis la kapon kun brilaj okuloj, paŝis en la homamason kaj ekkantis:

*Belegas ĉe Dali la tria monato,
Foiron vizitas jen ĉiuj gefratoj.*

*Ĝojplena l' popol' de ĉiuj naciecoj
Negocas dum ĉevalkonkurso kaj
kantado.*

.....

La kanto sonis tiel milde kaj dolĉe. Mi haltis.

"Rapidu, malgranda Zhang, ke viaj okuloj ne estu mislogitaj," urĝigis min baj-a junulo malgranda Yang, kiu min akompanis. Nur

tiam mi konsciis, ke mi estis ravita. "Zorgu vin. . ." ruze ekridetis al mi la junulo.

"Kial?" mi demandis mire.

"Ĉu vi scias, ke la Foiro de la Tria Monato ankaŭ estas tempo por la baj-aj gejunuloj amindumi. Se vi tiel staradas. . ." Je lia rimarko ni ekridegis brue.

Ni iris en la amasoj interbabilante. "La Foiro de la Tria Monato devenis de la ĉielo, ĉu vi scias?" Kaj malgranda Yang rakontis al mi belan legendon:

Antaŭ tre tre longe, vivis ĉe la lago Erhai brava junulo nomata Ashan, kiu sin vivtenis per fiŝkaptado. Iutage, furiozis ventego sur la lago levante gigantajn ondojn, sed malgraŭ tio Ashan devis fiŝkaptadi en la lago por akiri vivrimedon. Li laboris ĝis la vespero, tamen sukcesis kapti neniun fiŝon, kaj li ekkantis ĉagrene. Aŭdinte lian mornan kanton, la tria filino de la Drakoreĝo en la subakva palaco de Erhai naĝis supren tra la ondoj kaj intervidiĝis kun la junulo. Ili enamiĝis, gefianĉiĝis kaj geedziĝis je la bela Aŭtunmeza Festo. De tiam ili kunvivis feliĉe helpante unu la alian en fiŝkaptado. En la 15-a de la tria monato, la filino de la Drakoreĝo iris al la lagbordo, venigis drakon kaj rajdis sur ĝi kune kun Ashan al la Luna Palaco por ĉeesti foiron aranĝitan de la feino Chang-e en la luno. Kvankam tie estis multaj valoraj, tamen troviĝis nur tre malmultaj loĝantoj, tial la foiro ne estis hom- kaj ĝoj-plena. Ashan kaj la edzino iris al la feino kaj petis, ke ŝi transloku la foiron en la homan mondon. Chang-e estis kortuŝita de ilia sincera deziro, prenis du harpinglojn de sur sia kapo kaj ilin jetis al piedo de la monto Cangshan, kie tuj elkreskis du gigantaj



Kantfraŭlino



Fiŝado sur Erhai-lago

arboj. De tiam, la tereno inter la arbejoj fariĝis foirplaco. Ĉiujare en la 15-a de la tria monato lun-kalendaro popolamasoj kolektiĝas tie por foiraj aktivadoj. . .

Mi levis la okulojn kaj vidis, ke la du gigantaj arboj ankoraŭ bone kreskas kaj iliaj branĉoj kaj folioj ludas en la vento.

“Ĉu oni povas diri, ke la Foiro de la Tria Monato similas al la Printempa Festo de la han-oj?” mi demandis al malgranda Yang.

“Jes, jes. Ĉiu nacieco havas sian feston, ekzemple la taj-oj havas la Akvoverŝan Feston kaj la ji-oj la Torĉan Feston, ili similas al nia Foiro de la Tria Monato.”

Moviĝante kun la homfluo, ni alvenis baldaŭ al la Granda Ĉiovendejo. Tie montriĝis varoj de provincaj, subprovincaj kaj guberniaj vendejoj kaj produktaĵoj de komunumoj kaj brigadoj kaj individuaj komunumanoj-metiistoj. La marmoraj skulptaĵoj, lignaĵoj kaj porce-

lanajoj, pajlaj ĉapeloj kaj brodaĵoj lerte faritaj de baj-aj popolanoj allogis multajn klientojn. Knabinoj tie elektadis por si silkaĵojn, veluron, jadaĵojn kaj ornamaĵojn el oro kaj arĝento, dum junuloj estis allogataj de brilaj botoj kaj diversaj instrumentoj. La bambuaj nargileoj kun fajnaj desegnoj tre interesis la maljunulojn, dum la vendostandoj de kuiriloj kaj bambuaj objektoj altiris la atenton de multaj mastrinoj. Infanoj kun glaciaĵo aŭ bombonoj en mano amase kunpremiĝis ĉirkaŭ la vendejoj de ludiloj . . .

Apud la bruoplena placo tamen troviĝis loko kvieta. En ombroriĉa avenuo sidis amasoj de ĉin-ŝakamatoroj. Iliaj mienoj de absorbiteco kaj cerbumado prezentis tute alian etoson. La baj-oj havas longan tradicion de ĉin-ŝakludo kaj iliaj eminentaj ĉin-ŝakistoj estas alte honorataj.

Ni iris al la vendejo de agrikulturaj instrumentoj. Tie montriĝis

maŝinoj por degrajnado kaj pecetigado de furaĝo, transplantiloj, traktoretoj ktp. Ĉiuj tiuj maŝinoj estis produktitaj de entreprenoj guberniaj kaj komunumaj kaj ili estis bone akceptataj de la kamparanoj pro tio, ke ili tre konvenas al la kondiĉoj en tiu regiono.

La diversaj vendostandoj de la Foiro de la Tria Monato formis straton longan je ĉ. tri kilometroj kun la Ĉiovendejo kiel la centro. Ĉe ĝi troviĝis vendejoj de elektraĵoj objektoj kaj instrumentoj, ŝtofoj kaj vestoj. Sur montdeklivo troviĝis vendejo de ŝarĝbrutoj kaj ĉaroj. Post la vendejo de ĉaroj estis vasta placo de vendejoj de ĉinaj drogoj, ĉe kiuj troviĝis famaj lokaj drogoj kiel blanka medikamento kiu tre bone kuracas vundojn, pseŭdogin-sengo kaj tianma-a (*Gastrodia elata*)

La foiro daŭras 7 tagojn. Kompreneble unu tago ne sufiĉis por ke ni plene pririgardu tiel vastan foirplacon. Kiam la suno kliniĝis

al la okcidenta monto, ni forlasis, kun bedaŭro, la foiron kaj veturis al la Papilia Fonto per aŭtobuso. Vizito al tiu loko estas tradicia konsistiga parto de la aktivado de la foiro. Multaj junaj geamantoj iras al la fonto post pririgardo de la foiro.

La Papilia Fonto brilas en smeralda arbaro kvazaŭ gemo. Ĉe ĝi trilis birdoj kaj flirtis blankaj papilioj ĉasantaj unu alian. “Ankoraŭ ne venis la tempo,” rimarkigis malgranda Yang montrante la papiliojn. “En la kvina monato, ĉi tien alflugos miloj kaj miloj da papilioj, kiuj kolektiĝos ĉe la fonto kaj pendos unu sub alia de branĉoj kiel ĉenoj de floroj.

Mi etendis la manojn en la fontakvon kaj prenis iom por trinki — la malvarma kaj dolĉa akvo tre agrable refreŝigis min.

Ni iom ripozis ĉe la fonto, prenante manĝaĵon. Ĉirkaŭe en la

arbaro sin trovis multaj paroj de gejunuloj, plejparte farantaj korverŝajn interbabilojn en ama rendezvuo. Aŭdiĝis kanto en malproksimo. En la komenco mi ne atentis pri tio, sed malgranda Yang kaptis min kaj diris mistere: “Jen amkanto, aŭskultu!” Kaj mi aŭskultis atente:

*Blankaj nuboj ŝvebas en la blua
firmamento,
Nin regalu, franj’, per kant’ pri
via sento.*

*Ĉu vin tiel ĝenas tia prezentad’
de kanto?
Kial do ruĝiĝas vi en tiu ĉi
momento?*

La voĉo pli kaj pli malproksimiĝis. Tiam malgranda Yang stariĝis kaj signis al mi, ke mi sekvu lin. Ni preterpasis kelkajn arbojn kaj kaŭris post terbenko. Ho, jen, sub arbo en la oriento kuŝas amaso da bambuaj korboj apud kiuj staras junulo kaj nefore de li sidas kelkaj

junuloj. La knabinoj kaŝiĝas en la okcidenta densejo kaj iliaj vizaĝoj ne klare vidiĝas. Iom poste, ni vidis ke la junulo iras flanken kun unu el la knabinoj.

“Interkonsentite!” diris malgranda Yang ekfrapante sian femuron. “Ili interkonsentiĝis.” Li fikse rigardadis la gejunulojn ĝis ili malaperis en la foro.

Ni iris revene laŭ vojeto kaj malgranda Yang diris al mi, ke tio estas nur hazardo. La baj-oj ja havas longan tradicion de amindumado per amkantoj, tamen kun plivastiĝo de sociaj kontaktoj kaj altiĝo de la kulturo, tia maniero de esprimo de amo jam fariĝis malofta.


Elirinte el la arbaro ni renkontis junan paron irantan ŝultro ĉe ŝultro, kaj mi tuj rekonis la junulon kiu ĵus kantis amkanton. La junulino honteme cedis al ni la vojon. Mi subite rimarkis, ke sur ŝia mentono troviĝas bela grajno — la kantfraŭlino! ĉu ŝi?!

1. Ashan fiŝkaptas en la lago Erhai.




2. Ashan intervidiĝas kun la tria filino de la Drakoreĝo.





Papilia Fonto



Tri pagodoj de Dali

Ho, jen ŝajne la kantfraŭlino rekonis nin kaj ruĝiĝis pli forte. “Gratulon al vi,” mi diris, “kaj kantfraŭlino, mi esperas aŭdi viajn kantojn dum via geedziĝa festo.”

La kantfraŭlino profunde klinis kapon. Subite ŝi diris kelkajn vortojn, sin turnis kaj forkuris.

“Pro honto,” diris malgranda Yang, kaj poste li frapetis la junulon: “Tuj postkuru ŝin do.” La junulo ekridetis kun bedaŭro, diris ĝis-revidon kaj kuris al la knabino.

“Kion la knabino diris en la fino?” mi demandis al malgranda Yang sur nia revena vojo.


“Ŝi diris laŭ nia kutimo: ‘Vi estos bonvenigata al nia geedziĝa festo.’”

Laŭ la kutimo de la baj-oj, ilia geedziĝo okazos post unu aŭ du jaroj. Amikoj, ĉu vi volas veturi al Dali kune kun mi por ĉeesti ilian ĝojan feston? . . .

3. *Sur drako al la Luna Palaco*



4. *Chang-e ĵetis siajn du harpinglojn en la homan mondon.*





RESTAĴOJ DE KONSTRUOJ DE LA OKCIDENTA ZHOU-DINASTIO

de WANG ZHAOLIN

PER esplora prifosado, arkeologiaj laborantoj de nia lando trovis en Zhouyuan de Shaanxi (Senhi)-provinco du palacajn restaĵojn de la frua kaj meza periodoj de la Okcidenta Zhou-dinastio respektive antaŭ pli ol 3,100 kaj 2,900 jaroj. Unu el ili estas la unua ĝis nun trovita antikva konstruo kun koridora korto, al kies domoj oni plej frue aplikis tegolojn en Ĉinio.

Zhouyuan sin trovas en la centra okcidenta parto de Shaanxi, je ĉ. 100 kilometroj okcidente de Xi'an. Laŭ historia literaturo, la prapatroj de Zhou-dinastio starigis tie sian

ĉefurbon, post kiam ili translokiĝis tien de la regno Bin (ĉe Xunyi-gubernio de Shaanxi). Ĉar ĝi estas la loko, kie ekprosperiĝis Zhou-dinastio, ĝi havis templojn konstruitajn al la prapatroj de Zhou kaj okazadis ĉe ĝi kultado de la regantoj de Zhou al siaj prapatroj.

Ekde printempo de 1976, arkeologiaj laborantoj faris prifosadon de pli ol 3 jaroj, trovis multajn ostojn kaj testudajn ŝelojn kun gravuritaj ideografiaĵoj kaj bronzajn kaj fajencajn objektojn. Kaj la plej grava eltrovo estas tiu de la du palacaj restaĵoj.

En Fengchu-vilaĝo de Qishan-gubernio, oni trovis la palacan restaĵon kun koridora korto de la frua periodo de la Okcidenta Zhou-dinastio. La fundamento de la domo longas sude-norde je 45.2 metroj kaj larĝas je 32.6 metroj, kun areo de pli ol 1,400 kvadrataj metroj. La tuta fundamento troviĝis sur teraso el ramita tero alta je 1.3 metroj, en kies suda parto estas la pordego, en la mezo estas korto kaj en la norda parto estas ĉefa halo kun areo de 105 kvadrataj metroj. Post la halo estas koridoro, ĉe kies ekstremo troviĝas domo kun kvin ĉambroj. En la



Palaca restaĵo de la Okcidenta Zhou-dinastio antaŭ 3,000 jaroj trovita en Shaanxi - provinco


orienta kaj okcidenta flankoj de la korto troviĝas flankaj domoj kun po naŭ ĉambroj. Tia konstruaro kun enfermita korto prezentas al ni la originon de la kvadrataj kortoj enfermitaj de domoj en ĉiuj flankoj, tre popularaj en norda Ĉinio.

La restaĵo de la palaco kun koridora korto montras, ke la konstrua tekniko jam atingis certan nivelon, la akvodefluiga aranĝo estas racia, krom lignaj kolonoj, ŝtonaj bazoj kaj adobaj muroj, oni trovis ĉe ĝi la plej fruajn tegolojn de nia lando, uzitajn en malgranda nombro sur la firstoj. Laŭ la formo, strukturo, skalo kaj kvalito de la konstruaĵoj, ĉinaj arkeologoj asertas, ke ĝi estas speco de familia templo de la frua periodo de la Okcidenta Zhou-dinastio antaŭ pli ol 3,100 jaroj.

La palaca restaĵo trovita ĉe Zhaochen-vilaĝo de Fufeng-gubernio konsistas el 8 konstruaĵoj sur areo de ĉ. 6,000 kvadrataj metroj. Escepte de unu konstruo de la frua periodo de la Okcidenta Zhou-dinastio, ili ĉiuj estas konstruoj de la meza periodo de tiu dinastio. Ili

karaktariziĝas per tio, ke iliaj tegmentoj estas tute kovritaj per tegoloj subtenataj de reto de fostoj. Oni trovis ĉe ili kelkdek specojn de diversaj tegoloj kun malsamaj desegnoj, inter kiuj iuj surhavas elstaran "najlon". La kolonoj estas tiel dikaj, ke la plej dikaj ŝtonaj kolonbazoj havas diametron de 1.9 metroj, por ke ili povu bone subporti la tegmenton.

Kvankam nia lando jam trovis multajn restaĵojn de antikvaj konstruoj de la periodo de paleolitiko ĝis Zhou-dinastio, tamen neniam tian kiel tiu ĉi kun tiel kompleta kaj strikta strukturo. Ĝi liveras al ni valoregan materialon por pristudi la socian karakteron kaj la politikan kaj ekonomian sistemojn de la Okcidenta Zhou-dinastio. La apliko de tegola tegmento kaj subportaj kolonoj en konstruado estas du gravaj inventoj de la popolo de Zhou. Tio spegulis la altan saĝon de niaj praavoj antaŭ pli ol 3,000 jaroj kaj havis gravan influon al la konstruado de lignoframaj haloj de nia lando en la sekvantaj periodoj.



Subtera akvedukto el argilaj tuboj kun ŝnur-desegnoj



Arkeologoj esploras ostojn kaj testudajn ŝelojn kun gravuritaj ideografiaĵoj.



ANTI-KVAJ ORAJ OBJEKTOJ ELFOSITAJ EN SHANXI- PROVINCO

Iutage, kiam juna kamparano de Tunjungou-brigado de Shanxi-provinco faris sarkadon, li elfosis 34 kg. da antikvaj oraj objektoj inkluzive ringojn, ĉenojn kaj pinglojn. Li donis ĉiujn siajn elfositajn orajojn al la ŝtato. Kaj ankaŭ aliaj kamparanoj de tiu brigado trovis orpecojn, orĉenojn kaj ornamaĵojn kaj oferis ilin al la ŝtato.


Tunjungou kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estis landlima garnizonejo en antikveco. Lokaj kamparanoj trovis tie ankaŭ feran akson de antikva milita ĉaro, vazojn k.a.

VILAĜO DE PRIMITIVA SOCIO PRIFOSITA EN XINJIANG

En la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono oni unuafoje trovis restaĵojn de vilaĝo de primitiva socio antaŭ 2,400-3,000 jaroj.

La formo, produkta metodo kaj uzo de la elfositaj objektoj havas intiman rilaton kun la primitiva kulturo de la internaj lokoj de Ĉinio. Ili estas valoraj materialoj por esplori la kulturon de la primitiva socio de tiu regiono kaj la historion de la multnacieca unuigita Ĉinio.

Leonforma orfolio




MOSKULOJ BREDATAJ EN ĈINIO

En la lasta aŭtuno, la Eksperimenta Moskulbredejo de Shaanxi-provinco sukcesis en bredado de moskuloj en stalo, kiuj kutime ŝatas vivi solaj.

Moskulo estas sovaĝa besto. Moskoko sekreciita de vir-moskulo estas valora drogo kaj bonodora substanco. De la antikveco, en Ĉinio oni devis mortigi moskulon por elpreni ĝian moskon, tial la nombro de tiuj bestoj malgrandiĝis kaj la produktokvanto de mosko reduktiĝis.

Kolora argila poto



La moskuloj karakteriziĝas per izoligeemo, timemo, malpacienceemo kaj lerteco en kurado. Pro tio estas malfacile dresi kaj bredi ilin.

La laboristoj de la bredejo esploris ilian ekologion kaj kutimon, kaj bredas ĉiun el ili en aparta kvietaj malhela stalo. Dank' al tio ili ne nur vivas bone, iuj el ili eĉ naskis idojn. Nun la nombro de la moskuloj de la bredejo jam kreskis de kelkaj ĝis 207.

NOVA METODO DE TE-ARBA KULTIVADO

La Guizhou-a Teo-esplora Instituto kreis metodon de densa plantado de te-arboj, kiu ne bezonas sarkadon aŭ herbicidon. Tia teĝardeno povas produkti teon pli frue kaj pli multe. Tiu metodo estas disvastigata en multaj lokoj de nia lando sur pli ol 20,000 hektaroj de te-kultivejoj. En la jaroj 1973-1978 oni daŭrigis la eksperimentadon en pli ol 100 punktoj en orienta, sudcentra kaj sudokcidenta Ĉinio.

ARĜENTAJ ABIOJ NOVE TROVITAJ

Lastatempe forstokulturaj sciencistoj de Sichuan-provinco trovis 527 rarajn arbojn — arĝentajn abiojn (*Cathaya argyrophylla*) sur Jinfonto alta je 2,000 metroj super la marnivelo.

Antaŭ 10,000,000 jaroj kreskis multe da tiaj arboj sed plejparto de ili pereis pro detruado de glaci-rivero, kaj nur pli ol 200 postvivantaj estis trovitaj en Guilin de Guangxi (Guanghi) kaj sur Jinfonto de Sichuan.

Inter la nove trovitaj arboj la plej granda havas altecon de 46 metroj kaj trunkan ĉebrustan dikan de 53 cm. Tiuj arboj servas kiel vivanta materialo por biologoj

de Ĉinio kaj aliaj landoj en studo pri vegetaĵoj, grundo kaj geologio de glaci-rivera epoko.

“PENTRAĴOJ DE TANG YIN” REELDONITA

Lastatempe la Popola Belarta Eldonejo de Shanghai refoje eldonis la albumon “Pentraĵoj de Tang Yin”, en kiu kolektiĝis 40 verkoj de la pentristo. Tang Yin (1470-1523), alinomata Tang Bohu, naskiĝis en Wuxian-gubernio de Jiangsu-provinco.

Li estis lerta en pentrado de pejzaĝoj, floroj, birdoj kaj virinoj. Liaj pentraĵoj estas belaj, vivecaj kaj lakonaj. Liaj ĉin-inkaj pentraĵoj pri floroj kaj birdoj estas tre vivecaj kaj interesaj.

Li estis honore nomata unu el la kvar grandaj pentristoj de Ming-dinastio, kaj lertis ankaŭ en kaligrafado kaj poezio.

NOVA FRUKTO EN IMUNOHEMATOLOGIO

Ĉu oni povas uzi seron el besta sango anstataŭ tiun el homa sango por prepari seron por ekspertizi la sangogrupojn de la homo? Tiu problemo, pri kiu sciencistoj sin okupis dum pli ol duonjarcento, estas solvita de analizisto Ye Xueyong de Shanghai.

Laŭ la atingajo de lia eksperimentado en tri jaroj la Shanghai-a Instituto de Bio-produktaĵoj sukcese preparis tiun seron. Post la ŝtata ekspertizo, en la jaro 1975 oni komencis apliki tiun seron en kliniko, kaj milionoj da kazoj de klinika aplikado pruvis, ke ĝia titolo estas pli alta ol tiu de homa sero, ĝia koaguliĝo rapida, determino per ĝi preciza kaj ĝia kosto malpli alta je 90%.

ĈINSTILA ĜARDENO POR USONO

En la komenco de majo, ĉinstila pejzaĝa ĝardeno, kies kopio estos farita por la Nov-Jorka Metropola Muzeo de Arto, finkonstruiĝis en Chengdong-parko de Suzhou, Jiangsu-provinco.



La ĝardeno nomata Mingxuan estas projektita kaj farita de ĉinaj arkitektoj laŭ fama libro pri ĝardenarkitekturo de Ming-dinastio (1368-1644) kaj imite al la pejzaĝo Dian Chun Yi en la fame konata ĝardeno Wangshiyuan de Suzhou.

La ĝardeno konsistas ĉefe el halo kun tri ĉambroj, antaŭ kiu troviĝas korto kun artefaritaj montetoj, fontoj, kioskoj, zigzagaj koridoroj kaj ĉirkaŭmuroj. Tie estas plantitaj bambuoj, prunarboj, buksoj, aceroj, kanaoj kaj aliaj arboj kaj florplantoj. Kvankam la ĝardeno okupas nur areon de 0.07 hektaro, tamen en ĝi prezentigas esencaj belajoj de la Suzhou-aj ĝardenoj, kaj karakteriziĝas per harmonieco, eleganteco kaj sereneco de ĝardenarkitekturo de Ming-dinastio.

LONDONA FESTIVALA BALETA TRUPO EN ĈINIO

Laŭ la invito de la Kultura Ministerio de Ĉinio, la Londona Festivala Baleta Trupo gvidata de ĝia arta direktorino kaj fame konata baletistino Beryl Grey faris du-semajnan viziton al Ĉinio.

Tiu trupo estis fondita en la jaro 1948 kaj ĝuas altan renomon en Britio. La trupo kun 146 membroj prezentis la klasikan baleton “Giselle” kaj tri malgrandajn baletojn “Sanguĝa Ventumilo”, “Juneco” kaj “Etudoj” en la urboj Beijing kaj Shanghai. Ĝi ricevis varman akcepton de la ĉinaj spektatoroj per sia propra arta stilo.



Baleta “Giselle” prezentita de la Londona Festivala Baleta Trupo en Ĉinio

Supera Toniko
KUN MARKO "PINO"

FORTEGA ABELREGÎNA GELATO

Indiko:
Fortikigo de korpo
Beligo kaj tenado de la haŭtkoloro


Pakado:
30 kapsuloj por ĉiu botelo
unu kapsulo por ĉiu tago

Kun plej multa enteno de natura
abelregina gelato kaj ginsengo

Eksportanto:
Tianjin-a Branĉo de Lokaj Produktajoj de la Ĉina Stata Importa kaj Eksporta Kom-
panio de Lokaj Produktajoj kaj Animalaj Flankproduktajoj

Adreso: 33, Harbin-strato, Tianjin

Telegrafa adreso: "DRUGS" Tianjin



RAKONTOJ PRI FANTOM-SPITANTOJ

En la historio la ĉinaj reakciaj regantoj ĉiam utiligis superstiĉojn pri fantomoj kaj dioj por trompi kaj timigi la popolon kaj firmigi sian regadon.


Sed en la antikva Ĉinio cirkulis ankaŭ multaj rakontoj pri fantomspitantoj. Tiaj estas la rakontoj en tiu ĉi broŝuro, elektitaj el ĉinaj antikvaj literaturaĵoj. La rakontoj priskribas nemalmultajn homojn, kiuj kuraĝas insulti, forpeli, bati kaj kapti fantomojn, kaj vivece spegulas la sentimecon de nia popolo en la antikva Ĉinio. La rakontoj ne nur enhavas profundajn alegoriojn pripensigajn, sed ankaŭ komplikajn intrigojn kaj vivecan lingvon.

90 paĝoj k 9 ilustraĵoj 11.8 × 18.5 cm.
Prezo: £0.45 US\$0.90 FF4.20 DM2.30
Eldoninto: Fremdlingva Eldonejo, Beijing, Ĉinio
Ĝenerala Distribuanto: GUOZI SHUDIAN (Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio
Mendu Ĉe la peranto aŭ rekte ĉe la ĝenerala distribuanto.




Farado de silkaj antikvaj virinaj figuroj

BEIJING PRODUKTAS MEMORAĴOJN POR TURISTOJ





Jadajo "Turnebla Lanterno"

Nombro da fabrikoj de Beijing speciale produktas diversajn memoraĵojn por turistoj. En Beihai-parko, la Somera Palaco, la Imperiestra Palaco kaj aliaj turismaj lokoj funkcias specialaj butikoj de memoraĵoj, kaj en iuj turismaj lokoj estas instalita monŝanĝa servo por fremdlandaj turistoj.



Lanugajo "Petolema Vulpo"

Skulptita lakajo "Naŭ-persika Skatolo"




Klozoneajo "Pava Kruĉo"

Homfiguroj



Vaksaj fruktoj






Farado de malgrandaj kaj delikataj pastaj homfiguroj en juglandaj ŝeloj (ekzemploj supre maldekstre)

Incensujo



Ebura skulptaĵo "Grila Skatolo"



Oraĵo "Kaproj Inkrustitaj per Juveloj"

FOREIGN EXCHANGE
外币兑换处




Monŝanĝa servo por fremdlandaj turistoj en la Imperiestra Palaco



Turistoj elektas juvelojn kaj jadaĵojn.





FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ


fotitaj de japana esperan-
tisto **Harada Ikno**



Kafejo ĉe Fuji-monto

Fuji-monto





第十隻朱鷲 曾在日本列島棲息八個世紀迄今已類于滅絕
是鳥身生美珠取子心懷恐為其脚高此情也



PENTRAJOJ DE HAN MEILIN




下南作美九月年己
山於林日十正未




滄流未可淹高颺
 何去已



己未年二月
 美林於南山



美林



己未年歷下美林



XIAOHUA—SUDĈINIA TIGRIDO

La Chongqing-a Zoologia Ĝardeno de Sichuan-provinco sukcesis en arta generado de sudĉinia tigro.

Je la 7-a de decembro de 1978 sudĉinia tigrino en la nomita ĝardeno naskis idon kiun oni nomas Xiaohua. Tri tagojn post la naskiĝo ĝi preskaŭ mortis pro tio, ke ĝi estis tenata dente kaj portata tien kaj ĉi tien de la patrino dum sinsekvaj kelkdek horoj. La bredistoj forprenis ĝin de ĝia patrino, kaj dank' al ilia zorgema flegado la tigrido sane kreskas kaj, en malpli ol 4 monatoj, ĝia korpopezo plimultiĝis de 1 kilogramo ĝis 12.5 kilogramoj kaj korpolongeco atingis 69 centimetrojn. La patro de Xiaohua havas kvin jarojn kaj la patrino 4 jarojn. Ĝi estis la dua naskito de la patrino, kiu naskis ĝin post 102-taga gravedado.

Tigro estas speco el raraj animaloj protektataj de la ŝtato en Ĉinio. La nordorienta kaj sudĉinia tigroj de Ĉinio ĝuas renomon en la mondo.



Xiaohua montras apartan intimecon al la veterinaro

Xiaohua kaj ĝia bredistino



Xiaohua kun aĝo de tri
kaj duona monatoj



ĈINAJ POŝTMARKOJ

Ĉinio havas riĉan fonton de drogherboj, kiuj multe kontribuas en kuracado. Tiu ĉi kompleto de poŝtmarkoj "Drogaj Plantoj" estas emisiita de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio.

- 1 Ginsengo
- 2 Daturio
- 3 Belamkando (*Belamcanda chinensis*)
- 4 Balonfloro (*Platycodon grandiflorum*)
- 5 Rododendro



1



2



3



4



5

P73

